

1989 marto
82-a jaro
n-ro 999 (3)

(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



La 74-a UK:
Al Britio por sieĝi la anglan fortikaĵon

Vi trovos,

ke la debato pri strategio ne malaperis, sed transformiĝis el vortoj en agojn. Praktikajn ekzemplojn kaj konsilojn proponas manpleno da aktivuloj ĉi-numere. Dume ne ĉesis la teoria debato, ĉar venis inundo da reagoj al la projekto de Strategia Plano: ilin nun prilaboras nia prezidanto. Eble jam venontnumere vi povos legi pri liaj (kaj viaj!) ĉefaj konkludoj. Intertempe, ke la kalendaro nasku en vi belajn feriajn planojn!

Enhavo

- 41 Enkonduke al la 74-a Universala Kongreso de Esperanto: La kaŝita lingvo: kia egaleco por la irlanda? (Garbhan Mac Aoidh); Brajtono: Universala Kongreso – sen Esperanto (Marjorie Boulton); Lingvoj de Britio kaj Irlando (Girvan Mackay); Fisorto de mortanta lingvo; Literaturo pri vetero (Kris Long); Kampara paradizo – en revoj (Jane Edwards)
- 46 Validaj kandidatoj por komitataneco B
Landa agado: Ĉu ni fine malkovros Amerikon? (Simo Milojević); Kunlaboro en Nordio (Jukka Laaksonen)
- 48 Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino: Ĉu ludi universitaton, aŭ ludi la rolon de universitato? (Roland Schnell)
- 49 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis aŭgusto 1989)
- 52 Kongresa komunikado de la 74-a Universala Kongreso en Brajtono
- 53 Faka agado: Prepare al mediprotekta eklaboro (Maire Mullarney)
Edukado: Ne mankas ideoj (Anne Neave)
- 54 Lingvo: La transitiveco de verboj en Esperanto (Alan Towsey); Ĉu signifa termino? (Norman Lock); Se vi aĉetis porkidon... (J. Kavka); Kroniko de la Akademio (André Albault)
- 56 Ekstera agado: Parlamentanoj mem spertas la lingvajn barojn (Jerzy Uśpieński)
- 57 Planado: Profesiaj konsiloj en Belgio (Ivo Durwael)
Informado: Efika gazetara agado pere de komputoro (Ulrich Matthias)
Junularo: Pledo por regiona agado
- 59 La membraro de UEA en 1988: Stabileco ne sufiĉas
- 60 Anoncetoj; Oficiala informilo

La kovrilo

“La kongreso okazos en la hejmo de la angla lingvo, en la lando kie tiu lingvo naskiĝis kaj unue evoluis. Ni diskutu, ĉu la angla proponas solvon al la monda lingvo-problemo. Kiaj estas ĝiaj lingvaj kvalitoj? Kia estas ĝia vera pozicio en la mondo? Ĉu ĝia pozicio donas, aŭ povas doni, “egalecon”? Ni diskutu, kial ni proponas alian solvon. . . .”

Tiel pledas profesoro John Wells en la Dua Bulteno de la 74-a Universala Kongreso. Efektive estas strange, ke ni neniam mem entreprenis seriozajn studojn pri la funkciado de la angla en internacia komunikado. Eble ni subkonscie timas la rezultojn! Sed estos signo de nia matureco, se en Brajtono ni sentabue mezuros la dikecon de la ŝtonoj en ĝia kastelo kaj ne kontentiĝos per nura malestima ĉirkaŭpromeno. . . .

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakvivilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (36/1) 317 243; telefakso: (36/1) 666 808; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, “Quasi in Cima”, Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

Tradicie ĉi tiu revuo provas iom prilumi en marto la julian aŭ aŭgustan kongreslandon. Ne vere temas pri reklamo, kvankam ni ja volas stimuli viajn fantazion kaj scivolon. Estas pli afero de "edukado al tutmonda konscio": ebligite, ke vi rigardu trans la lingvajn murojn al nekonataj landoj kaj kulturo. Kaj tio estas ankaŭ movada edukado, ĉar ni tiel samtempe lernas pri la fortikaĵo de la nuna lingva-kultura sistemo, kiun sieĝas nia eta sed obstina gerila armeo.

Ĉi-jare, vi eble demandas vin: Ĉu la mondaj amaskomunikiloj ne ĝissate informas nin pri la hejmlando de la angla, ĉu tie la temo "**Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado**" ne velkos en senpovan frapadon sur la fortikaĵajn murojn? Surprizoj troveblas ĉie. Ankaŭ en Anglio, la fasado de unueca angla lingvo kaj kulturo kaŝas certajn fendojn en la remparoj, kiujn oni konstruis sur la sabla supozo ke historiaj venkoj estas eternaj. Komplikan, buntan kaj malkliŝan socion vi trovos sur la sekvaj paĝoj. (Kaj ne nur de Anglio: ja la postkongresojn gastigos Kimrio, Skotlando kaj la Irlanda Respubliko.) Kun Garbhan Mac Aoidh vi povos malkovri la diversecon de la brita lingva heredaĵo kaj profundigi en la vivlukton de la irlanda lingvo. Tra la okuloj de Marjorie Boulton vi vidos la kalejdoskopon da rasoj sur la stratoj de sudanglia urbo. Kris Long ekpentros por vi pejzaĝon de la angla lingvokulturo, pejzaĝon kun nuboj kaj montetoj kaj vilaĝoj kun nekompreneblaj nomoj. Kaj kun Jane Edwards vi eble fine demandos, ĉu Britio iam estis tiu simpla, hela mondo de fabelo kiu ankoraŭ logas la turistojn – kaj decidis mem veni por sperti ĝian nunan realon.

La kaŝita lingvo: kia egaleco por la irlanda?

Antaŭ nelonge eksterlandano venis loĝi en kampara urbeto en meza Irlando. En tiu regiono la normala ĉiutaga lingva komunikilo estas la angla. Iufoje li ĉeestis publikan kunvenon pri eventuala fondiĝo de nova tutgala lernejo en la urbo. Je la granda surprizo de la fremdulo, ekde la momento de sia eniro en la plenŝtopitan salonon li aŭdis nur flue parolatan gaelan (irlandan) lingvon, kvankam li rekonis multajn el la ĉeestantoj kiel najbarojn kaj kunurbanojn kiuj ĉiutage parolas nur la anglan. Ŝajnis ke granda parto de anglalingva urbo subite kaj tute nature metamorfozis en keltan komunumon.

Iu irlanda verkisto iam nomis la indiĝenan gaelan kulturon "la kaŝita Irlando", kaj efektive ĝi hodiaŭ ofte ŝajnas subtera fenomeno. Gaellingvanoj malvolonte parolas kun fremduloj en sia lingvo, kaj preferas uzi ĝin nur en la intimeco de ŝlositaj ĉambroj aŭ en foraj regionoj.

Pluraj observantoj jam menciis la kuriozan fakton, ke ekskolonioj de Britio (Hindio, Niĝerio, Ganao, Irlando ktp) ĝis nun malsukcesis anstataŭigi la truditan anglan per la originalaj indiĝenaj lingvoj. Laŭ la konstitucio de la Respubliko Irlando, la unua oficiala lingvo de la ŝtato estas la gaela [vd. la sekvan artikolon], sed malgraŭ grandaj klopodoj fare de oficialaj instancoj kaj entuziasmoj, la angla restas la preferata lingvo de la plimulto, krom en la tiel nomataj *Gael-tacht* (gaela regionaro), t.e. la okcidenta kaj suda marbordoj, kaj malgranda regiono norde de Dublino.

Parodokse, en la ses nord-irlandaj graflandoj (departementoj) ankoraŭ administrataj de la londona registaro, kie la irlanda lingvo estas preskaŭ malpermesita de la protestanta plimulto, oni lastatempe konstatas konstantan kreskadon de la nombro da irlandlingvanoj kaj fervoraj lernantoj de la lingvo, sed preskaŭ ekskluzive (ne totale) inter la naciista katolika frakcio de la loĝantaro.

Pluraj faktoroj estigis la aktualan malfortan staton de la gaela en la suda parto de la insulo, i.a. la ideo ke ĝi estas

naiva lingvo de malriĉaj, neinstruitaj kamparanoj; la malfacileco (kompare kun la angla) de ĝia komplika gramatiko; la fakto, ke ĝi estas uzata kiel militkomunikilo de naciistaj ekstremistoj; ĝenerala perdo de respekto al ĉiuj simboloj de patriotismo (ekzemple oni ne plu volas saluti la flagon, aŭ stariĝi dum ludado de la nacia himno); la sento ke la angla estas pli utila kaj pli ŝika; kaj precipe la fakto ke, sekve de konstanta amasa elmigrado, la pli multaj irlandanoj nun loĝas ne en Irlando sed en Usono, Britio kaj Aŭstralio. Preskaŭ neniu irlanda familio malhavas parencojn kiuj vivas en anglosaksaj landoj.

Ne multe malpli grava estis la alveno de la televido al la tuta insulo. Programoj kaj filmoj en la irlanda lingvo estas altkvalitaj sed tre maloftaj, ĉar la produktokostoj de programoj por malgranda spektantaro, kiuj apenaŭ estas eksporteblaj, estas ege altaj – tro altaj por eta, malriĉa lando. Tial la ŝtata televidinstanco ĉiutage dissendas programojn en la angla lingvo, faritajn en Usono kaj (malpli ofte) en Britio. El tio sekvas, ke kruda imitaĵo de usona lingvaĵo fariĝas la preferata lingvo de la junularo, kiu ĉiukaze ambicias elmigri por eskapi de la terura senlaboreco kaj ekonomia stagno hejme.

Alia irlanda aŭtoro, kiu verkis du librojn laŭdantajn la aktualan *Taoiseach*-on (ĉefministron), sed poste profunde seniluziiĝis, skribis en sia lasta verko: "Irlando ne estas sendependa ŝtato en

Foto: Hilary Chapman



Malpli kaŝita lingvo: De jardekoj la kimroj, precipe la nordaj, publike batalas por plia rekono por sia lingvo. "Kimrio ne estas aĉetebla" tekstas la afiŝo meze de ĉi tiu manifestacio en la nordkimra urbo Llanrwst, la 10-an de decembro 1988.

la sama senco kiel aliaj eŭropaj landoj. Ĝi perdis sian lingvon, ekonomian sendependecon, memestimon . . .”

Malapero de la irlanda lingvo estus grava perdo, kaj por Irlando kaj por la mondo. Ĝi estas lingvistike grandvalora, historie gravega, literature signifoplena, esprimplena, profunde humana. La gaela literaturo – pli ol miljara en skriba formo, kaj multe pli aĝa en buŝa tradicio – estas unu el la plej antikvaj kaj plej riĉaj en la spirita trezorejo de Nordeŭropo. Tamen, dum la lastaj jardekoj, la kvanto de bonaj gaellingvaj libroj eldonitaj en Irlando draste malkreskis, kaj la literatura kvalito – krom en la poezio – malpliboniĝis kaj steriliĝis. (Paradokse, en Skotlando, kie la nombro de legantoj de gaelaj libroj estas tre malgranda, aperas ankoraŭ vigla literaturo.)

Kvankam la stato de la irlanda lingvo* ofte aspektas senespera, oni ne forgesu ke la irlandanoj estas laŭnature optimistoj. Kiel ŝtatanoj de relative nova sendependa nacio (sed samtempe antikvega popolo), ili ŝajne suferas de minus-komplekso. En alia senco, nenio ŝanĝiĝis sur la Verda Insulo. Ĝi estis invadita de vikingoj, anglonormandoj, angloj**, skotaj presbiterianoj kaj usona kulturo. Ĝiaj lingvo kaj kulturo estis ĉiam en kriza situacio, kaj ankoraŭ estas. Ekde la 17-a jarcento oni asertas, ke la gaela lingvo baldaŭ mortos. Kvankam ege malsana, ĝi ankoraŭ spiras kaj esperas. Kio okazos post la plena integriĝo de la Eŭropa Komunumo oni ne scias. Angla influo preskaŭ ekstermis la gaelan lingvon. Ĉu la EK volos savi ĝin?

Garbhan Mac Aoidh

*Eble la plej konciza kaj interesa populara verko (bedaŭrinde nur en la angla) pri la irlanda lingvo estas la ilustrita libreto *The Irish Language* (“La irlanda lingvo”), Aspects of Ireland/Gnéithe dár nDúchas n-ro 10, Departemento pri Eksteraj Aferoj de la Irlanda Registaro, Dublino, ISBN 0 906404 20 7.

**Irlando estas la sola ano de la EK kiu estas ekskolonio de alia membroŝtato de la sama organizo.

Lingvoj de Britio kaj Irlando (mallonga gvidilo por kongresanoj kaj turistoj)

En la malvastaj Britaj Insuloj, kiuj ĉi-jare gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto, la nombro da dialektoj estas ege granda. Homo, kiu sufiĉe spertas pri la afero, povas facile rekoni laŭ la dialekto la hejmlokon (t.e. graflandon, regionon, insulon, urbon aŭ eĉ kvartalon) de iu ajn, krom parolantoj de la tiel nomata *standard English* (“norma”, t.e. elita angla).

Eble malpli sciata, tamen, estas la fakto, ke estas surprize granda nombro da *lingvoj* (ne nur dialektoj de la angla) en Britio kaj Irlando, sen enkalkuli la multajn ekskoloniajn idiomojn parolatajn de enmigrintoj el la transmaraj landoj de la antaŭa Brita Imperio.

Jen listo de indiĝenaj britaj/irlandaj lingvoj, kiuj ankoraŭ ekzistas kiel vivantaj idiomoj (do sen inkludi la tute mortintajn britajn lingvojn kiel la piktan, danan ktp):

KELTAJ

(pra-idiomoj parolitaj jam antaŭ la anglosaksaj invadoj)

- *kimra* (la plej grava kelta lingvo en Britio, laŭ kvanto da parolantoj)
- *skota gaela* (precipe en nordokcidenta Skotlando)
- *irlanda gaela* (unua oficiala lingvo de la Respubliko Irlando; ankaŭ parolata de naciistoj en Nord-Irlando)
- *kornvala; manksa gaela* (hodiaŭ uzataj nur de kelkaj entuziasmoj en Kornvalo kaj sur la Manks-Insulo, respektive)
- *ŝelta* (hodiaŭ nura miksitaj ĵargono de irland-devenaj nomadoj, la tiel nomataj *Tinkers* aŭ *Travellers*)

Brajtono: Universala Kongreso – sen Esperanto

En Brajtono, kiel en turismaj urboj multloke, atentu vian monujon, vian fotoaparaton aŭ magnetofonon; unu fripono el eble dek mil britoj povus mizerigi vian viziton. Sed la vasta plimulto de la britoj estas honestaj, pli-malpli ĝentilaj, kaj ofte sincere helpemaj, ekzemple se vi demandas pri la vojo ien, aŭ



Parto de la hunta surstrata vivo en suda Anglio.

ĜERMANAJ

- *angla* (oficiala lingvo de Britio, kun origino en la okcident-saksa dialekto de enmigrintaj ĝermanaj triboj ĉ. 450 p.K., poste forte influita de tri jarcentoj de franca regado)
- *malalteja skota* (parolo bazita sur la norda *nesaksa* angla lingvo, kun aldono de gaelaj kaj francaj vortoj ktp)

SKANDINAVA

- *norna* (parolata kiel unua lingvo en Ŝetlando kaj – en malpli pura formo – sur la Orkadoj; miksaĵo de normana, skota kaj angla, sed originale tute skandinava)

ALIA HINDO-EŬROPA

- *cigana* (nun efektive estingiĝanta, krom kelkaj vortoj kaj frazoj)

LATINIDA

- *anglo-normanda* (francaj dialektoj de la Manikaj Insuloj)

...

Jen specimenoj de kelkaj el ĉi tiuj lingvoj:

KIMRA: Dyletswydd ysgolion yw eu cynorthwyo, nid yn unig i gadw'r iaith gyntaf, ond hefyd i'w meithrin fel cyfrwng mynegiant a diwylliant.

(La devo de la lernejoj estas, ke ili kunhelpu ilin ne nur unue konservi la lingvon, sed ankaŭ flegi ĝin kiel komunikilon kaj kulturilon.)

SKOTA GAELA: Is iad na siorrachdan anns a bheil an àireamh as àirde de luchd-bruidheann na Gàidhlig Ros is Inbhirnis.

(La graflandoj en kiuj estas la plej granda kvanto da parolantoj de la gaela estas Ross kaj Inverness.)

havos akcidenton. Ni estas plejparte mildaj kaj pacamaj, sed ne tro fidu pri tio, se temas pri rivalaj futbal-teamoj, kiuj ofte vekas kvazaŭ triban lojalecon tre kontrastan al la angla toleremo pri multaj kristanaj sektoj kaj aliaj religioj kaj pri multaj politikaj partioj. Niaj policianoj, kiuj normale ne portas pafilojn, estas ĝentilaj kaj helpemaj al ĉiuj kiuj kondutas leĝobee; parto de ilia devo estas helpi kaj informi.

Ni angloj preferas stari en vico ol interpuŝiĝi, kaj ekstervica enpuŝiganto vekas indignon. Ni abomene emas faligi fatrason surstrate, kvankam kontraŭleĝe; bonvolu ne imiti; ni plejparte obeas malpermeson fumi diversloke; bonvolu imiti. Vi rajtas fotografi preskaŭ ĉie, se avizo ne malpermesas. Se vi vidos gejunulojn kun plej bizarajn hararangojn, eĉ pintegojn verdajn aŭ karmezinajn, vi ne havas halucinon, kaj ili probable tute ne estas danĝeraj. Anglio dum jardekoj havis reputacion de malsana prudeco, sed ni rajtas kisi kaj brakumi surstrate, enparke, marborde, kaj tute decaj homoj foje faras tiel.

Ni havas kelkajn ĵurnalojn, iom kostajn, multrilate modelajn laŭ stilo, informado kaj relativa honesteco; aliajn, hontinde trivialajn, plenajn de trosimpligoj kaj mensogoj, sensacioj ofte senkore ĉasitaj. Dum generacioj ni plejparte libere mokadis niajn registarojn; ni pli kaj pli emas malpufigi bombastojn; ni iom emas al mem-ironio pri ni mem individue kaj eĉ nacie. Sed ni ofte eĉ ne konstatas, kiel aroganta estas nia ĉefa esceptaĵo al nia etiketo de modesteco: ni emas trotaksi la universalecon de la angla lingvo. Ni iom atendas ke vizitantoj posedu nian lingvon, sed ankaŭ, alilande, ke vizitatoj parolu ĝin! Estos en Brajtono do granda avantaĝo, se vi povos en kafejoj, hoteloj, muzeoj ktp, iom paroli angle.

Sed la angla ne estas la brita. Eĉ en Anglio mem ekzistas multaj lokaj, kaj ankaŭ klasaj, variaĵoj. La lingvo kiun vi studis

tre taŭgos inter kleraj angloj, sed fortan dialekton vi eble tute ne komprenos. Kaj ne petu min interpreti: vere fortajn dialektojn ofte ne bone komprenas mi mem!

Nuntempe ekzistas ankaŭ multaj britaj civitanoj, kies hejma lingvo ne estas la angla aŭ eĉ alia historie brita lingvo. Kial? Britio havas longan noblan tradicion akcepti rifuĝintojn – dum miaj milittempaj studentaj jaroj la triono de miaj geamikoj estis judaj rifuĝintoj – kaj dum jaroj iu ajn el la iama Brita Imperio rajtis libere veni al Britio; multaj aliaj, ofte el malriĉaj landoj, venis por labori pli prospere. Nuntempe, pro la alta procento de britoj ne multgeneracie etne britaj, kaj pro sociaj komplikaj, enmigrado estas multe malpli facila; sed la etna konsisto de la brita civitanaro jam modifiĝis por ĉiam. Mi mem dum kelkaj jaroj havis najbarojn bangladeŝajn, mian ĵurnalon vendas iranano, ĉina familio vendas al mi fiŝaĵojn foje, aŭ mi aĉetas foje *doner-kebabon* de proksima turka vendejo; amaso de afrikdevenaj homoj elegante vestitaj vizitas la stratofinan preĝejon dimanĉe, nur kelkajn paŝojn for de eta moskeo, jamajka restoracio, kaj butikoj plena de precipe grekaj juveloj. . . . Estas nun multaj britoj, kelkloke tutaj kvartaloj, kies unua lingvo estas la urdua aŭ la pangaba, la ĉina aŭ la bengala, la greka (plejparte el Kipro) aŭ la persa, la itala aŭ la pola, aŭ unu el la multaj kreol-lingvoj, ekzemple el la kariba regiono. Mi aldonu, ke precipe en urboj turismaj kaj universitataj – kaj Brajtono estas ambaŭ – troviĝas multaj studentoj, komercistoj kaj turistoj alilandaj, inter ili multaj japanoj, araboj kaj amerikanoj. Do, angla urbo povas nuntempe ŝajni kvazaŭ Universala Kongreso sen Esperanto; se vi provos vian lernejan anglan por demandi ion, kaj iu rigardos vin hontete kaj silente, verŝajne ne temas pri malamo. Tiu eble estas alilandano aŭ neangleparolanta brito.

Marjorie Boulton

IRLANDA GAELA: *Féadfar ceadúnas a fháil in aon Oifig Phoist. Iarrtar ort an Fógra seo a thíolacadh nuair a bheidh tu ag iarraidh an ceadúnas.*

(Permesilo povas esti akirita en iu ajn poŝtoficejo. Oni petas ke vi prezentu ĉi tiun avizon kiam vi petos la permesilon.)

MALALTEJA SKOTA:

Fisorto de mortanta lingvo

(de la skota poetino Joy Hendry, prenita el *La skota lingvo* de William Auld)

*I dinnae see the mense o ma strauchle,
ettlin tae pou up frae the dub o history
a leid that's nocht but a shadda
o the speak it yince wis.*

*When naebody kens an naebody cares
if they've tined a puckle here, ithers there
o the wirds their mithers spak,
lettin the shilpit, gleg-gabbit Suddron
smool quaiet-like intae the mither tongue,
as gif its roch, grainy vocables
were nocht but clart tae slauch oot . . .*

(Mi ne vidas sencon en mia luktado, provante elŝiri el la koto de la historio poemon, kiu estas nur ombro de la lingvo kiu ĝi iam estis. Kiam neniuj scias kaj neniuj zorgas se ili perdis kvanton tie, aliajn ĉi tie, de la vortoj, kiujn parolis iliaj patrinoj, permesante ke la magra fanfaronema angla lingvo enŝteliĝu nerimarkite en la patrinlingvon, kvazaŭ ties fortaj, raspaj sonoj estus nenio alia ol malpuraĵo forviŝenda . . .)

KORNVALA: *Lehmen an ostenz an chey, hey a kynsylaz gen nebyn manah a era en tre, dho dhestrya an den cōth.*

(Nun la domgastigantino komplotis kun iu mohafio kiu estis en la urbo, por mortigi la maljunulon.)

MANKSA: *Shee as graih eddyr mraane as deiney; cooid as cowryn; stock as stoyr.*

(Pacon kaj amon inter virinoj kaj viroj; posedaĵojn kaj riĉecon; bestaron kaj provizon.)

MALALTEJA SKOTA: *Sair fleggit, he skelpit aff as fast as he micht. Nearhaund he saw a muckle hoose on a knowe wi a grit broon dure stannin wide open.*

(Tre elĉerpita, li rapidis kiel eble plej multe. Tute proksime li vidis grandan domon sur monteto, en kiu estis plene malfermita pordo.)

NORNA (ŜETLANDA): *Wi e haand i grips dan da breest o his cott, an dere on da flör as we stöd i da mids, i shaks him da same as da kishie o sids.*

(Per unu mano mi tenis la brustumon de lia jako, kaj tie sur la planko, dum ni staris en la mezo, mi skuis lin kiel korbon da guŝoj.)

...

Kiu diras, ke la Britaj Insuloj ne bezonas internacian lingvon?

Girvan Mackay

BIBLIOGRAFIO (bedaŭrinde nur en la angla lingvo)

Lockwood, W.B. *Languages of the British Isles Past and Present* (Lingvoj de la Britaj Insuloj, pasintaj kaj aktualaj). Londono: André Deutsch, 1975. ISBN 0 233 96666 8.

Literaturo pri vetero

“Diable malfacila lingvo” – jen la unua penso, ĉu? (Eble post “nebula Albiono” . . .) Nu, ankaŭ angloj trovas sian (?) lingvon problema. Rigardu mapon de Britio: tiom da nekompreneblaj nomoj . . . Sufiĉas kelkaj vortoj en la kimra por diveni ke jen “domo en la arbaro” ktp – sed anglaj nomoj restas nesondeblaj krom per fakaj studoj. Tiom da tavoloj pro sinsekvaj ondoj: brita (kelta), romia, skandinavia (ĝermana), franca . . . kaj ree latina, ĉar en la 18-a jarcento kleruloj kun kompleksoj pri angla mizero kompare kun la veraj lingvoj (greka kaj latina) ŝanĝis vortojn por doni pli klasikan aspekton.

Aŭ ĉu “la lingvo de Ŝekspiro”? Feliĉaj homoj, kiuj povas ĝui la anglan ĉefpoeton en tradukoj! Angloj en lernejo ne komprenas eĉ la ŝercojn sen klarigoj (al ŝerco post ekspliko mankas piko), dum la verkoj kiuj renaskis la skribitan lingvon en la 14-a jarcento (post 300 jaroj sub franca influo) – la pilgrimaj versrakontoj de Chaucer, kaj aliaj – estas nur por altgradaj studoj. Des pli tio, kion oni verkis ĝis la franca invado en ĝermana lingvo tute fremdaspekta.

Anglaj vortoj do plej strangajn historiojn kaŝas. Vorto kiun mi transskribos *duns* (malsame ĝi aspektas) signifas “idioto”, sed devenas laŭ vortaro de Duns Scotus, teologo kiu verkis ĉ. 1300 kaj estis “tro subtila”, harfenda – do stulta laŭ pritaksoj tri jarcentojn poste. Al anglaj gustoj pli plaĉis lia samtempulo Vilhelmo el Okam, kiu *forrazis* nenecesajn konceptojn. *Anglaj gustoj?* En la empiriisma tradicio sekvis skota Hume, irlanda Berkeley, aŭstra Wittgenstein . . .

Eble eĉ pli plaĉus samtempulo de Tomaso el Akvino, kiu dum la vintro de 1269-1270 notis la veteron surmarĝene de astronomia kalendaro. Sekvis lin aliaj praktikemuloj: dum la epoko de la religiaj bataloj meze de la 17-a jarcento Isaak Walton verkis *La kompleta fiŝhokanto*, en 1789 aperis *La naturhistorio de Selbourne* (rivereto tra salikoj) de vilaĝa pastro Gilbert White – pri hirundoj kaj apusoj, la datoj kiam ili forflugas kaj revenas post migroj . . . (Sed nenio pri fungoj: laŭ angloj ĉiuj krom agarikoj venenas.) Taglibro pri ekstera, nur implice pri interna vetero . . . Ne hazarde angla kvakero Luke Howard (el la epoko de bataloj pri religio fontas ankaŭ kvakera silentemo) estis tiu, kiu baptis nubojn (en la tempo de Goethe). Vetero, laŭfame la ĉiama angla paroltemo, ĉefrolanto de la mistera ludo kriketo, kies maĉoj kontraŭ pluvo daŭras plurajn tagojn . . . Vetero tiel malkonstanta, ke matene vi bezonas vesperan prognozon, ke vintro povas esti du semajnoj iam ajn inter novembro kaj aprilo (aŭ foje tute ne okazas). Vetero pli okupas anglajn pensojn ol metafizikaj kaprompoj.


Ni revenu al Duns Scotus, kiu releviĝis post jarcentoj. La poeto (jezuito) Gerard Manley Hopkins trovis liajn “tro subtilajn” teoriojn tiel simpatiaj, ili tiel spronis lin atenti la kreitan mondon, ke li sentis rajton verki pri naturo – kaj aliĝis al la granda tradicio kiu festas la kamparon kaj montaron de Britio. Kiuj restas britaj – ĉar insulo havas ja fiksjajn landlimojn, eĉ se kovris ĝin diversaj ondoj de invadoj. Hodiaŭ oni povas, rokgrimpante sur montselo, la saman malfacilan lokon atingi kiel S.T. Coleridge antaŭ 200 jaroj, povas vidi tiujn deklivojn kiujn rememoris Edward Thomas kaj Ivor Gurney dum la buĉoj en fremda koto en 1914-18 . . . Ilia kamparo estis tute angla, kun deklivoj kaj montetoj, tiuj *hiloj* kaj *kolinoj* kiuj havas nur piĉeskajn nomojn. Ili havis propran regionon, eĉ paroŝon, kiel dum la epoko de Napoleono Jane Austen, kiel Thomas Hardy aŭ D.H. Lawrence – kiu sukcesis resti angla eĉ skribante pri etruskaj aŭ meksikaj temoj (kaj sufiĉe juna mortis – feliĉe! – por eniri la duan volumon de *Angla antologio*).

Sed, vi diros, angle verkis James (usona), Conrad (pola), Joyce (irlanda) – ĉu ekzistas io tute angla? Ĉu vere anglas *Alica*

en Mirlando? Ĉu Winnie-la-Pu? La evangelia Progreso de l' pilgrimanto? Aŭ la aŭtoro de la malice pika vers-satira “Dunsodo”, katolika nano Aleksandro Pope? Ĉu Christopher Smart, kiu ĉ. 1760 laŭdis sian katon Ĝefri “ĉar unu muso el sep eskapas dum li prokrastas,” “ĉar anglaj katoj estas la plej bonaj en Eŭropo”? Aŭ la teozofiaj vizioj de William Blake? Ĉu William Barnes, dialekta poeto kaj poliglota pastro en la provinco de Hardy, kiu sopiris puran anglan lingvon sen latina fatraso? Aŭ la matematika baroko de William Empson? Aŭ ĉu la “daŭre verda lingvo” de John Clare?

Ho ve, nur pluaj nekonataj nomoj sur la mapo! Do (damne!) jukas min ekciti: “*Ebone brila sub gutantaj dornoj / helik’, palpinte herberetojn korne . . .*” (“Arto perceptas per helika

Foto: Aŝmola Muzeo, Oksfordo



Kampara paradizo – en revoj


Mi forlasis Brition antaŭ preskaŭ dudek jaroj – entuziasme. Multo, precipe la rigida strukturo de sociaj klasoj kaj la mizera klimato, ja ne plu plaĉis al mi. Dum la jaroj, tamen, kreskis ĉe mi (kiel supozeble ĉe la plimulto de elmigrintoj) certa nostalgio. Mi sentas la mankon de aferoj, kiujn mi eĉ ne rimarkis kiam mi tie loĝis, kaj de aferoj, kiuj verŝajne eĉ ne ekzistis. Ĉi-rilate mi similas multajn britojn mem, kiuj loĝas en urbe kaj nutras sin el kredo je iu sentempa, kampara pejzaĝo, iu ĉiama Anglio, kie trab-fasadaj vilaĝaj trinkejoj nestumas inter rondaj verdaj montetoj. Korvoj en ulmoj, brilantaj ĉeval-latunaĵoj, knabetoj en lerneja uniformo kiuj ruĝgenue malrapidas hejmen sub pluveto – vidaj memoroj, humaj kaj malsekaj kiel la freŝaj floroj kiujn oni ĉie vidas en Britio – kaj ĉio elvolviĝanta antaŭ fono de birdokantado.

Sendepende de tio, ĉu tiu intense trankvila, antikva pejzaĝo ekzistas en realo aŭ nur en la pentraĵoj de Constable kaj la sonĝoj de ekzilitoj, mi mem estis urbano kaj mia sperto de tiu kampara Edeno estis plejparte imaga eĉ kiam mi loĝis en Britio.

korno," diris Keats.) Ĉar, same kiel angloj preferas lasi metafizikajn celojn kaŝitaj (glori Dion per atento al humoroj de la Di-kreita mondo, ne teorii per tro cerbumitaj konceptoj), ili havas propran manieron en ekzemple recenzoj, nome *citi* la koncernan verkon, laŭ modelo *Jen*: "...", *ĉu ne?* – *Jes, sed* ... (Redakcioj de mezeŭropaj revuoj en la angla bonvolu noti: recenzon oni ne povas traduki – nur reverki!) Kaj do ...

Rapoj (Edward Thomas): *L'argiltegmenton oni sengabligis / sur longa rapamaso por prisuni / purpure, blanke, ore krispajn frondojn / sensunajn. Pli volupte rava vido / arbarangule, kie vintro gutas / ĝemante, ol la Valo de l' Reĝtomboj / dum knab' en faraonan tombon rampas ... / Sed mortis antaŭlonge Amen-Hotep. / Jen vintra sonĝ', kun dolĉo de l' printemp'.* – ĉu ne?

Kris Long



*Montara metafiziko:
la ekzaltitaj, viziaj
"Shoreham"-pejzaĝoj
de pentristo Samuel
Palmer (1805-1881)
spegas la anglan
okupiĝon pri la natura
mondo, kiel ĉi tie en
"La blanka nubo"
(1831-32).*

Mia Anglio estis la griza ŝtona urbo, kie la solaj arbaroj sur kiujn la pluvo falis estis tiuj de lerte mastrataj pluvombreloj, kaj kie, ĉe la vendejo Fortnum kaj Mason, la mielo ĉiam fluadis sub la atenta gvido de antikvaj kelneroj.

Tamen Londono ja multe ŝanĝiĝis dum la pasintaj dudek jaroj. Kie oni iam povis imagi Sherlock Holmes alvokanta kaleŝon, tie la butikŝildoj nun portas la araban lingvon kaj la kinejoj montras egiptajn filmojn. La butikoj de s-ro Jones ĉe la stratangulo, kiu antaŭe fermiĝis je la kvina, estas nun memserva kaj, sub pakistanaj proprietuloj, malferma ĝis noktomezo. Nubskrapaloj staras en urbaj stratoj ankoraŭ nomataj, anakronisme, "Teraso Patro-Nia", "Panostrato", kaj "Strato de Nigraj Monaĥoj". Tie iam marŝis romiaj soldatoj, feŭdaj lordoj, monaĥoj kaj komercaj maristoj, kaj la tuta rolantaro de Charles Dickens. Hodiaŭ pli abundas la betono, malmultas la ligno; ekstrema malriĉeco reduktiĝis, pli buntas haŭtkoloroj.

Britio fariĝis en certaj rilatoj pli eŭropa, en aliaj rilatoj pli usona – precipe se temas pri la amaskomunikiloj. Mi ĉiam amis la britan radion, unike babileman kaj eklektikan komunikmedion

DUA INTENSIVA PEDAGOGIA-METODIKA KURSO

organizata de UEA-ILEI kun KCE

La Chaux-de-Fonds (CH), 10-22 julio 1989

Celo: rajtigo al Esperanto-kursgvidado laŭ la internacia unuigita programo de UEA kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La kurso okazos laŭ la instruprogramo de UEA-ILEI, ses horojn ĉiutage, kaj finiĝos per praktika kaj teoria ekzamenoj por la atestilo de UEA-ILEI, rajtiganta gvidi internaciajn Esperanto-kursojn. Ĉefgvidanto de la kurso estos **Irena Szanser**, kunlaboranto en la fremdlingva fakoj de Varsovia Instituto por Klerigo de Instruistoj kaj membro de la Eduka kaj Ekzamena Komisiono de ILEI.

Ĉiu aliĝinto tuj post la aliĝo ricevos didaktikan helpmaterialon, kun kiu nepras konatiĝi antaŭ la komenco de la kurso. Oni devas krome antaŭsendi skriban laboraĵon, du- ĝis tri-paĝan, pri unu el dudek listigitaj temoj, kiujn oni diskutos dum la kurso. Diplomataj instruistoj de fremdlingvoj povas esti liberigitaj de la unuaj kvin kursotagoj. Por ricevo de la atestilo ili tamen devas submetiĝi al la praktika kaj teoria ekzamenoj kiel la aliaj.

Prezo por la tuta aranĝo, inkluzive de manĝoj kaj tranoktado: 810 svisaj frankoj en kvarlita ĉambro, 900 sfr. en dulita, 1080 sfr. en unulita. Studento montranta atestilon ricevas 50-frankan rabaton; diplomatoj nepartoprenantaj la unuajn kvin tagojn ricevas 30%-an rabaton. Aliĝojn sendu antaŭ la fino de aprilo al:

Kultura Centro Esperantista, Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; antaŭpagon (300 sfr.) al poŝtĉekkonto 23-2921-8.

Post la kurso okazos la 1-a Seminario Internacia pri Lingvo-Didaktiko, samloke de la 24-a ĝis la 27-a de julio. Petu apartan informilon.

kiu liveris epizodajn dramojn, vortkonkursojn, kaj muzikprogramojn selektitajn de aŭskultantoj, kiel ekzemple "Familiaj furoraĵoj". Tio plejparte malaperis, favore al pli nerva transatlantika stilo. La televido rampas en la direkto de la usona modelo de perforto, sekso kaj insido – kvankam usonaj kablaj entreprenoj entuziasme elacetas la ankoraŭ brile aktoratajn, teknike kapricajn dramojn, kiuj iam konsistigis la esencon de la brita televido.

Gastronomie, la nacio intertempe galopis Eŭropon: la dommastrino, kiu iam en la stratangula butikoj aĉetis "duonaĵon da stria lardo", nun petas "cent gramojn da pariza pasteĉo kaj iomete da tiu bongusta *prosciutto*". Feliĉe, preter tiu en si mem bonvena ŝanĝo, la ruĝtapetaj hindaj restoracioj de miaj studentaj tagoj ankoraŭ ĉie produktadas siajn salikokajn "birjanojn".

La angloj malpli interesiĝas pri sociaj klasoj ol ili faris dum mia infaneco – la mondo tamen ŝanĝiĝis, kaj cetere nun eblas maltrankviliĝi pri rasaj dividoj. Mi naskiĝis kimra, kaj la kimroj neniam multe atentis pri klaso; sed nun ĉie en Britio oni trovas novajn kriteriojn por antaŭjuĝi kaj klasifi la homojn, precipe lige kun mono anstataŭ la malnova sistemo de familia deveno kaj parolmaniero.

Eble la ŝanĝprocezo tamen alportos malpli da antaŭjuĝemo al tiu socio, jam pli diversa kaj malpli limiga ol tiu kiun mi forlasis kun tiom da entuziasmo. Nun kiam mi faras viziton, mi estas pli preta pardoni pro la iama kritikemo kaj la mil sociaj reguletoj de mia juneco. Kune kun la turistoj kaj la aliaj revenantoj, mi sentimentale serĉas, en la verdaj valoj kaj la lastaj stratetoj el la epoko de Dickens, tiun sceptran insulon, tiun duonparadizon, kiu eventuale ĉiam pli proksimis al revo ol realo.

Jane Edwards

Ĉu ni fine malkovros Amerikon?

De la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 1988 okazis en la Kongresa Palaco de Havano (Kubo) la Konferenco "Esperanto 88". La ideo aranĝi tian internacian kunvenon naskiĝis antaŭ du jaroj, kiam UEA ekstraktis kun Kuba Esperanto-Asocio pri la organizo de la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en tiu lando en 1990. Oni deziris, ke ĉi tia Konferenco servu kvazaŭ organiza provo por la posta granda Kongreso.

La Konferenco arigis iom pli ol 200 partoprenantojn, ĉefe el Kubo mem, sed venis dudeko da gastoj ankaŭ el Sud-Ameriko (Brazilo, Kolombio, Meksikio), el Francio, Hungario, Kanado, Koreio, Nederlando, Norvegio kaj Pollando. Kiel "ekzerco" por la Kongreso en 1990, la Konferenco ne imponis nombre. Tamen, ĝi estis valora sperto por la organizantoj, kiuj unuafoje devis solvi kelkajn komplikajn aŭ delikatajn problemojn, kia sendube estis la sukcesa venigo de gasto el Suda Koreio, lando kun kiu Kubo ne havas diplomatajn rilatojn.

Por ni eksterlandanoj la plej grava trajto de la Konferenco estis la grado de la atento kaj helpo, kiun ĝi ricevis de la ŝtataj aŭtoritatoj: la inaŭguron ĉeestis i.a. la estro de la Kultura Fakto en la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo, unu el la vicministroj pri kulturo, kaj direktoro de la Fremdlingva Eldonejo. Tie kompreneble estis ankaŭ aro da ĵurnalistoj, televidaj, radiaj, gazetaj; la nacia poŝto honoris la Konferencon per specialaj stampo kaj koverto. Pri tia publika atento Esperantaj aranĝoj en la resto de la mondo apenaŭ povas revii. Aliflanke, tiu socia rekono al Esperanto estas pruvo pri la celtrafa agado de Kuba Esperanto-Asocio, kiu en sia laboro evidente ne flegas utopiajn verdismajn ideojn sed sekvas la sociajn evoluojn kaj sukcesas fariĝi parto de ili. Ekzistas movadanoj aŭ eĉ landaj asocioj, kiuj konsideras tian socian integriĝon esti ia "perdo" de memstareco; mi tamen inklinas nomi ĝin trafa recepto de sukcesa landa agado por la internacia lingvo.

La konferencaj laboroj disvolviĝis en tri apartaj sekcioj: instruado, informado kaj kulturo. Ĉiu el la sekcioj aŭskultis plurajn prelegojn kaj – ĉefe – rezultigis tre viglan diskutadon. Aparta atento estis dediĉita al la nova Strategia Plano de UEA. Teatraĵo, ekspozicio, altkvalita koncerto, akcepto, bankedo kaj ekskurso estis la aliaj partoj de la sukcesa programo. Ĉio realigita preskaŭ ekzkluzive per propraj, lokaj fortoj kaj talentoj.

Kiel ajn, la esenca valoro de la Konferenco estis el mia vidpunkto io tute alia: la renkontiĝo de aktivuloj el kvar sud-amerikaj landaj asocioj, tiuj de Brazilo, Kolombio, Kubo kaj Meksikio. Iliaj kunvenoj okazis kvazaŭ eksterprograme –



Supre: Pli intensan kunlaboron planas la gvidantoj de la landaj asocioj en Brazilo (Néia Lúcia Souza, maldekstre) kaj Kolombio (Luis Jorge Santos-Morales, dekstre). Inter ili sidas kuba organizanto Maritza Gutiérrez González. **Dekstre:** La talenta kuba duopo Maritza kaj Argelio Guadarrama jam realigis kantokasedon, Flugos kolomboj, kiu baldaŭ haveblos de UEA.

Validaj kandidatoj por komitataneco B


Ĝis la limdato anoncita en la novembra numero (la 15-a de februaro) alvenis 16 validaj kandidatiĝoj. Ĉar estas nur ok lokoj (unu por ĉiu komencita milo de individuaj membroj), la ĉi-jara elekto estos vere signifohava! Ĝojigas, krom la multeco de la proponitoj, ankaŭ la diverseco de la reprezentitaj landoj, kaj la fakto ke pluraj junaj kaj novaj vizaĝoj aperas inter nomoj jam vaste konataj. Jen la listo, en alfabeto ordo:

- | | |
|---------------------------------------|---------------------------------------|
| 1. d-ro Detlev Blanke, Germana DR | 9. d-ro François Lo Jacomo, Francio |
| 2. s-ro Lucien De Sutter, Belgio | 10. s-ro Stefan MacGill, Hungario |
| 3. d-ro Thomas A. Goldman, Usono | 11. s-ro Fernando A. Paredes E., Kubo |
| 4. d-ro Albert Goodheir, Britio | 12. s-ino Ĵila S. Saheb-Zamani, Irano |
| 5. s-ino Ursula Grattapaglia, Brazilo | 13. d-ro Carl Støp-Bowitz, Norvegio |
| 6. s-ro Paul Jegorovas, Sovetunio | 14. d-ro Humphrey Tonkin, Usono |
| 7. s-ro Rob Keetlaer, Nederlando | 15. s-ro Yosimi Umeda, Japanio |
| 8. d-ro Ulrich Lins, FR Germanio | 16. d-ro John C. Wells, Britio |

Voĉdonilo estos dissendita fine de aprilo kun la Gvidlibro kaj Jarlibro 1989. Sur listo kun ĝi troviĝos, krom la nomoj, ankaŭ biografiaj detaloj kaj resumo de la movadaj celoj de ĉiu kandidato. Post forpaso de la limdato por voĉdono, komisiono konsistanta el la Ĝenerala Direktoro kaj du individuaj membroj, nomumitaj de la Estraro, malfermos la senditajn kovertojn kaj nombros la voĉojn. La rezultoj poste estos anoncitaj en la revuo. (Pliaj detaloj troveblas en la Ĝenerala Regularo de UEA, havebla senpage de la Centra Oficejo.)

vespere, lunĉopaŭze, nokte. Ili diskutis la neceson de intensa kunlaboro inter la sud-amerika aŭ tut-amerika esperantistaro. Memfidaj pri siaj fortoj, pravaj en sia konstato ke la eŭropanoj nur parte aŭ plej ofte neniom komprenas la specife sud-amerikajn problemojn, tiuj aktivuloj (inter ili estis prezidantoj de tri landaj asocioj) decidis ekagi novstile. Observinte tiujn interparolojn nur parte, i.a. por ne trudi al ili "eŭropismajn" starpunktojn, mi eble ne sukcesos trafe resumi tiun novan agadstilon. Jen almenaŭ provo:

La sud-amerika Esperanto-movado havas kvaliton kaj homfortan potencialon, kiuj minimume egalas al tiuj de la movado en Eŭropo. Antaŭ deko da jaroj, kiam mi unuafoje estis tie pro la posta Kongreso en Brazilo en 1981, mi estis simple ŝokita renkonti centojn da lokaj movadanoj, kiuj ne nur majstris la



lingvon kaj aĝis duonon de la vivojaroj de mia eŭropa verda ĉirkaŭaĵo, sed ili ankaŭ sciis ĉion pri ni kaj mi, dum mi konis nenion pri ili. Similan sperton mi havis poste en Meksikio kaj lastatempe en Kubo.

Intertempe Sud-Amerikon plagas ekonomiaj problemoj. Ankaŭ la tiea movado spertas ilin. Dume, ni sidas kaj atendas, ke ili solvu tiujn problemojn. La drasta malaltigo de la asociaj kaj kongresaj kotizoj por Sud-Ameriko, kiun en la lastaj jaroj faris UEA, montriĝas esti nur parteto de la solvo. Dume, ankaŭ la sud-amerikaj landaj asocioj sidas kaj atendas, ke ni solvu la problemon de ilia integriĝo en la internacian movadon.

Nun ili en Kubo decidis ne plu sidi kaj atendi. Ili deklaras pli realan membronombro al UEA, por havi rajton je pliaj komitatanoj kaj sekve akiri pli laŭtan voĉon en la gvida organo de UEA. Se ni ne trovas (ĉar ni serioze ne serĉis) manieron ke la revuo *Esperanto* havu sud-amerikan eldonon, ili lanĉos sian propran komunan periodaĵon.

Krome, Sud-Ameriko jam havas kelkajn atingojn pri kiuj la resto de la movado povas envii ĝin: "Fonto" estas unu el la plej aktivaj movadaj eldonejoj; Sylla Chaves en Brazilo kaj Santos Morales en Kolombio superŝutas la merkaton per modernaj kaj altkvalitaj lerniloj; Argentino produktas lernolibrojn ankaŭ por Hispanio; Brazilo havas propran teatran trupon kaj altkvalitan muzikan kulturon; Venezuelo ĉesas flegi Esperanton nur en sia

ĉefurbo; Meksikio staras antaŭ movada revolucio, portata de aro da kapablaj gejunuloj; Kubo fondas propran Internacian Esperanto-Centron kaj pretiĝas por gastigi Universalan Kongreson venontjare.

Jen tiu nova agadstilo de la sud-amerika E-movado. Ni ne plu sidu kaj atendu, ĉu ĝi sukcesos. Ni helpu sukcesigi ĝin. Estas ja delonge tempo, ke ankaŭ ni en la movado efektive malkovru Amerikon.

Simo Milojević

Kunlaboro en Nordio

Norda Eŭropo (Nordio) konsistas el kvin landoj: Danio, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio. La landoj havas plurcentjaran komunan kulturan tradicion, kaj kunlaboro inter ili okazas en plej diversaj fakoj kaj aferoj sur ŝtata, regiona kaj organiza niveloj. Pro tio estas preskaŭ memklare, ke ankaŭ la Esperanto-organizaĵoj de ĉi tiuj landoj havas kunlaboron. Ĝis nun la kunlaboro plejparte konsistis el komunaj renkontiĝoj kaj interŝanĝo de spertoj. Pri la kunlaboro oni povas ankaŭ mencii la komunan junularan gazeton *Kvinpinto*.

Pasintjare la reprezentantoj de la landaj asocioj kunvenis en Roterdamo dum la Universala Kongreso kaj iniciatis fondadon de kunlabora komisiono. Ĉiuj landaj asocioj poste akceptis la iniciaton kaj tiel fondiĝis Nordia Kunlabora Komisiono, kies celo estas unue difini la fakojn, en kiuj kunlaboro estos utila, kaj poste verki programojn por efektiviigi ilin samtempe kaj kune en ĉiuj kvin landoj.

La komisiono kunsidis unuan fojon en Gotenburgo (Svedio) la 21-an kaj 22-an de januaro. Ĉeestis Allan Mogensen (Danio), Jukka Laaksonen kaj Sabira Ståhlberg (Finnlando), Árni Böðvarsson (Islando), Elna Matland (Norvegio), kaj Karin Lindquist kaj Märtha Andréasson (Svedio).

Dum du laborplenaj tagoj la komisiono pretigis programon por la jaroj 1989-90. Ĝi koncentriĝas ĉe ekstera informado. Kiel celgrupojn oni elektis kelkajn internaciajn organizojn, al kiuj oni proponas Esperanton kiel solvon al iliaj lingvaj problemoj. Tiaj estas ekzemple Asocio Nordio (Norden, la internordia amikeca asocio), Nordia Konsilantaro (interŝtata kunlabora konsilantaro de Nordio), Amnestio Internacia, Internacia Organizo de Infanvilaĝoj ktp. La komisiono vigle diskutis pri proponoj faritaj de la landaj asocioj, kaj ĉiu asocio krome prezentis siajn aktualajn informilojn, kiujn oni komparadis. Aldone oni faris iniciaton inviti la kulturministroy de ĉiuj kvin landoj viziti Universalan Kongreson de Esperanto, eble jam en Brajtono.

La komisiono decidis kunsidi unufoje jare, sekvontan fojon en Oslo (Norvegio), kaj krome la ĉeestontaj komisionanoj havos kunvenon ankaŭ dum Universalaj Kongresoj. Oni ankaŭ interkonsentis pri plia partopreno de landaj respondeculoj en jar-kongresoj de aliaj nordiaj Esperanto-organizaĵoj.

Samtempe kun la kunsido de la kunlabora komisiono malfermiĝis vasta Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko de Gotenburgo, kaj la komisiono ĉeestis la inaŭguron de ĝi.

Jukka Laaksonen

Ame kaj klare verkita klasikaĵo:

Vivo de Zamenhof (1920) de Edmond Privat

134 p. 18 cm. Bind. 18,90 gld; triona rabato ekde tri ekz.

Ĉu ludi universitaton, aŭ ludi la rolon de universitato?

La talaroj de la profesoroj brilas en la belega helblua koloro, kiu similas al unu el la du koloroj en la flago de San Marino, sendependa respubliko ekde la jaro 301. La ŝtato, kiu situas kiel enklavo en Italio dudek kilometrojn for de la apudadriatika urbo Rimini, dum sia longa historio eble neniam rimarkis la mankon de altnivela scienca institucio, sed tamen favore reagis al la propono krei iun, kiu ricevis la nomon "Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino" (AIS). Dum la solena malfermo de la 5-a Sesio de tiu ĉi akademio fine de aŭgusto 1988, la profesoroj estis vestitaj en la menciitaj talaroj, kiujn poste, dum la same solena fermo, rajtis surmeti ankaŭ la sukcesintaj kandidatoj de ekzamenoj.

Monaĥoj ofertis sian funkciantan monaĥejon kiel portempan domon de la Akademio. Tiu ĉi centro de la Akademia vivo situas ĉe la piedo de kruta deklivo sub la sanmarina ĉefmonto kaj ĉefurbo. Apartigita de la turisma, ekonomia kaj administra koro de San Marino per nur kelkcent metroj (bedaŭrinde vertikale), AIS povis trankvile kaj sen eksteraj perturboj plenumi sian programon de prelegoj, kursoj, ekzamenoj kaj kunsidoj. La vesperoj kunigis la partoprenantojn en la diversaj restoracioj de la ĉefurbo, kaj por simplaj manĝoj kaj por bankedoj.

La celoj kaj intencoj ligitaj kun AIS ankoraŭ estas malklaraj por la plej multaj kiuj interesiĝas pri ĝi, kvankam abundas statutaj, regularaj kaj aliaj dokumentoj. Mian viziton motivis la espero, ke la partopreno dum sesio en San Marino, la interparolo kun simplaj partoprenantoj, prelegantoj kaj ĉefoj, povas esti okazo por akiri iom da klareco pri la afero.

Ĉu la ido de iu profesoro Frank iĝis komuna ido?

AIS nek ekzistus nek estus en sia nuna situacio sen la pasia aktiveco de profesoro Helmar Frank (Instituto por Kibernetiko, Universitato Paderborn, FR Germanio). Tamen li ne estas sola kaj evidente ne intencas daŭrigi kiel la granda ĉefo. En la tradicio de L.L. Zamenhof li nur ellaboris kaj prezentis projekton, kiun li donis al la publiko. Estus nun la tasko de aliaj transpreni kaj pluevoluigi la projekton. Sed ŝajnas ke tiuj, kiuj sole rajtas fari tion, ne volas aŭ ne kapablas. La anoncitaj kunsidoj de la diversaj sekcioj de AIS, minimuma elemento de demokratio kaj akademia memadministrado, parte ne okazis. La koncernaj profesoroj faris la decidojn, laŭ ili necesajn, en iu kafejo kaj pro tio ne sentis la bezonon de oficiala kunveno aŭ formalaj elektoj. Tio evidente malfaciligis al aliaj anoj de la sekcio la akiron de informoj pri la evoluo kaj celoj de la sekcio, kaj eventuale bremsis ilian pretecon al kunlaboro.

Statutajoj kaj regularoj ne zorgas pri kafo

La breĉo inter ruze elpensitaj statutajoj kaj la praktikaj bezonoj de la vivo estis klare videbla, sed (mirinde) ne kaŭzis grumblon. Eĉ en Pollando ne estus imagebla scienca kunveno, kiu tiel neglektas la plej bazajn bezonojn. Kafo, la fuelo* de ĉiu scienca aktiveco, ekzistis nur en formo de antaŭmendendaj gutoj dum la matena paŭzo. Aliaj trinkaĵoj tute ne estis haveblaj, kaj la plej proksima restoracio estas atingebla nur per 15-minuta marŝo. Pri fotokopiilo oni povis nur revii, kaj la sola mekanika tajpilo estis posedaĵo de partoprenanto, kiu embarase forportis ĝin antaŭ la pretigo de la atestoj.

Ŝarĝita per la diversaj praktikaj laboroj estis la familio Frank, edzino kaj filino de la profesoro, kiu mem devis pasigi sian tempon ĉe la diversaj kunsidoj, ekzamenoj, kaj aliaj akademi-

**fuelo*: energifonto (PIV-suplemento)

anaj taskoj. Kompare kun la detale ellaboritaj statuto kaj regularoj pri kotizoj kaj ekzamenoj en AIS, oni ne povas diri ke abundas pensoj pri la praktikaj kaj teknikaj necesoj kiujn postulas universitat-nivela strukturo. Povas esti, ke en la konscio de profesoroj tiuj aferoj ne ludas rolon, ĉar en ordinara universitatoj ili estas malŝarĝitaj de tiuj teknikaj detaloj fare de nesciencaj dungitoj. En AIS la familio Frank laboras laŭeble por plenumi la taskojn de sekretario, sed ne kapablas fari ĉion.

AIS: kiucele kaj kiudirekten?

En la atmosfero de sciencaj prelegoj, akademiaj ekzamenoj kaj oficialaj bankedoj, neniuj laŭte kaj oficiale parolis pri siaj individuaj intereso kaj privataj celoj ligitaj kun AIS. Tamen estis senteble, ke tiuj intereso ekzistas kaj estas tre diversaj. Estas profesoroj, kiuj atendas ke ili ricevos en San Marino la respekton de studentoj kiun ili ne plu ricevas en la propra universitato. Estas aliaj, kiuj esperas ke ilia funkcio en tiu ĉi akademio altigos ilian reputacion en la propra universitato. Estas tiuj, kiuj pensas ke universitat-nivela strukturo kiu utiligas Esperanton estas bona afero, kiu daŭrigas kaj evoluigas la ideon de kongresaj aŭ someraj universitatoj kaj aliaj sciencaj renkontiĝoj.

Ĉeestis malnovaj esperantistoj kaj aliaj, kiuj nur pro AIS lernis lingvon kiun ili nomas "ILO", kiel Frank instruis al ili, sed kiu tre similas al Esperanto, kiel oni ŝerce diris. Por tiuj, kiuj havas spertojn de aliaj Esperanto-aranĝoj, mankis la tipa "etoso", sed ĉiuokaze estis belegaj tagoj. La bela pejzaĝo kaj la pitoreska ĉefurbo, la delikataj manĝaĵoj kaj la bonaj vinoj en si mem indas la viziton.

Evoluigebla kaj evoluiginda

La Akademio kaj la ŝtato de San Marino povas esti sufiĉe allogaj por krei stabilan kaj sencohavan sciencan institucion kiu utiligas Esperanton. Sed estas solvendaj kelkaj gravaj problemoj tre baldaŭ. La altaj prezoj de la hoteloj estas unu el la kaŭzoj kiuj malhelpas la ĉeeston de sciencistoj kaj studentoj el socialismaj landoj, kvankam tie troviĝas la plej granda nombro de sciencistoj parolantaj Esperanton.

Certe la situacio plifaciliĝos, kiam AIS ricevos de la ŝtato la promesitan konstruaĵon, eksan monaĥejon proksiman al la centro de la urbo, kie iom post iom povos ekesti konstante funkcia scienca institucio kaj administracia centro. Tie oni intencas ankaŭ zorgi pri malmultekosta tranoktado kaj preparo de malmultekostaj manĝoj. En la konstruaĵo troviĝos konstanta sekretario, biblioteko, kaj kolekto de vidbendaj prelegoj.

La unua paŝo por la plivastigo kaj sendependa evoluo de la sekcioj jam okazis. Plia evoluo dependas de la preteco de pliaj sciencistoj aktive partopreni en la laboro de AIS. Ĉiu sciencisto, kiu parolas aŭ legas Esperanton, estas petata plenumi pri personan demandilon, por ke li aŭ ŝi povu ricevi informojn pri AIS. Al ĉiuj AIS proponas okazon por aktive kunlabori en la konstruo de universitat-nivela institucio, kiu baziĝas sur la praktika apliko de Esperanto (aŭ ILO, se iu preferas). Ekzistas la skafaldo, kiun Frank konstruis, kaj kiu fiksas la rekoneblan formon de la konstruaĵo. Sed ĝi donas liberecon al la masonistoj plenumi ĝin per propraj ideoj kaj modifi ĝin certgrade, por ke ĝi estu komuna domo.

Pliaj informoj kaj pripersonaj demandiloj estas haveblaj de: Akademia Internacia de la Sciencoj San Marino, Kleinenberger Weg 16b, D-4790 Paderborn, tel. (0049) 5251-64200.

Roland Schnell (FR Germanio)

Kalendaro

Pliaj detaloj pri la ĉi-subaj aranĝoj estas ofte, sed ne ĉiam, haveblaj ankaŭ de la Centra Oficejo (tel. +31 10 436 10 44 / Mark Fettes)

daŭre **BET "Esperantotur"**, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapeŝto, Hungario

aprilo

- 03-08: **Seminario "Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj"** kaj **Esperanto-ekzamenoj laŭ la normo de UEA-ILEI**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 07-09: **10-a Grandpoluja Esperanto-Printempo**, Śrem (Poznań), Pollando (Esperanto-klubo przy Spółdzielni Mieszkaniowej, ul. Nowotki 1, PL-63-101 Śrem)
- 07-09: **Kunveno de Esperanto-kolektantoj**, Strážnice, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, Pk. 34, CS-696 62 Strážnice)
- 08-10: **Bulgara Junulara Printempa Renkontiĝo**, Sofio, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, bul. Āristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 21-23: **Sveda Kongreso de Esperanto**, Norrköping, Svedio (Haldo Vedin, Jordbrog. 57, S-60364 Norrköping)
- 22: **2-a Printempa Renkontiĝo**, Jablonec nad Nisou, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, PS 190, CS-466 21 Jablonec nad Nisou)
- 26-30: **7-a Internacia Metodika Seminario**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-IMS, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad; temo "Lingvopedagogiaj aspektoj de Esperanto-instruado")
- 27-01: **17-a Scienca Interlingvistika Simpozio**, Varsovio, Pollando (Akademia Centro Interlingvistika, RN ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa)



Ŝipekskursoj tra Nigra Maro, Mediteraneo ktp estas nur unu faceto de la agado de Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica (Bulgario). Entute pli ol 18500 homoj profitis de ĝiaj servoj dum la lastaj du jaroj.

- 28-01: **Preparsemajnfino por la 45-a IJK**, Mülheim/Rühr, FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1)
- 28-01: **Esperanta Biblio-Seminario**, Bad Wimpfen (Heilbronn), FR Germanio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-7730 VS-Villingen)
- 28-07: **Berlina Arbara Renkontiĝo**, Bad Münden (Hannover), FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1)
- 29-01: **15-a Unuamaja Renkontiĝo de Jugoslavio Esperanto-Junularo**, Bugojno, Jugoslavio (15-a URJEJ, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 29-01: **Internacia Seminario por Zagreb-metodaj E-Instruistoj**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

majo

- 03-06: **22-a Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj**, Sagamiko (Tokio), Japanio (NEO-Tokio, Kawamoto Hiromi, Yokoyama-sō 105, Wakamiya 1-40-6, Nakano-ku, 165 Tōkyō-to)
- 03-07: **Ĉielirfesto**, Grollo (Drenthe), Nederlando (Johan Swenker, Bottemaheerd 51, NL-9737 NA Groningen; temo: "Ĉu vi stultas sufiĉe por partopreni ĉi tiun stultan renkontiĝon?")
- 05-10: **Zamenhofa Internacia Pacmarŝo/BBB-Renkonto**, Verőce-maros/Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)
- 06-07: **Konferenco "Quo vadis Europa?"**, Verona, Italio (Esperanto-Tregnago, Via Unita 31, I-37039 Tregnago)
- 06-07: **Kafoklaĉo**, Kaiserslautern, FR Germanio (GEJ, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1)
- 12-15: **Germana Esperanto-Kongreso**, Kronach, FR Germanio (Ursula Felhöter, Lathener Str. 4, D-5400 Osnabrück)
- 12-16: **81-a Franca Kongreso de Esperanto**, Vichy, Francio (Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 13-15: **3-a Studa Semajnfino pri Arbaro** (en arbaro kun arbaristo), KCE, Svislando (adreso supre)
- 13-19: **41-a IFEF-Kongreso**, Salou (Katalunio), Hispanio (p/a Ruiz de Padrón 45-2-2, E-08026 Barcelona)
- 15-20: **5-a Seminario pri la Nomoj de Sovaĝaj Plantoj**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 15-28: **Universitata Sesio de AIS**, Krynica, Pollando (mgr. inż. Jan Talik, ul. Słoneczna 19/57, PL-32-050 Skawina)
- 19-22: **1-a Ontaria Esperanto-Kongreso**, Ottawa, Kanado (LKK de OEK-1, Pf. 554-filio B, Ottawa, Ont., Kanado K1P 6C3; ld. 28 aprilo)
- 19-22: **84-a Skota Kongreso de Esperanto**, Town Mill (Strathaven), Skotlando (Jean Bissett, 47 Airbles Crescent, Motherwell, Skotlando [Britio] ML1 3AP; temo "Paco")
- 20-21: **Kulturfestivalo de Kroatia Esperanto-Junularo**, Kumrovec, Jugoslavio (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 20-22: **Amika Semajnfina Renkontiĝo**, Saint-Irénée, Kebekio, Kanado (Esperanto-Societo Kebekia, CP 126, succ. Beaubien, Montréal H2G 3C8)
- 25-02: **Cseh-metoda Kurso kun Kuracferiado**, Miskolc-Tapolca, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)
- 25-28: **Junulara Semajnfina Turisma Renkontiĝo**, Prago, Ĉeĥoslovakio (Jindřich Havlík, Plechanovova 383, CS-109 00 Praha 10)
- 26-28: **9-a Internacia Konkurso-Recitalo pri Botev kaj Bulgara Poezio en Esperanto**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 29-30: **Internacia Renkontiĝo de la Gvidantoj de Esperanto-teatroj kaj Kulturaj Festivaloj**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)

junio

- 02-04: **Norvega Esperanto-Kongreso**, Haugesund, Norvegio (Mara Vento, Postboks 59, N-5501 Haugesund)
- 09-11: **4-aj Turismaj Esperanto-Tagoj**, Sofio, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, bul. Āristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

- 12-21: **Terminologia Seminario**, Poprad (Altaj Tatroj), Ĉeĥoslovakio (Wera Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, DDR-1141 Berlin, Germana DR)
- 16-29: **1-a Internacia Renkonto kun Koro**, Krynica, Pollando (Esperantotur, Al. Wolności 37F m8, PL-33-300 Nowy Sacz; por amsopiraj soluloj)
- 16-30: **Internacia Amika Renkonto**, Kastelo Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 20-30: **2-a Internacia Muzika Seminario**, Internacia E-Kursejo (Pisanica), Bulgario (IEK, Pozitano 40, BG-1000 Sofia)
- 21-28: **5-a Junpionira Esperanto-Somero**, Stambulčić, Jugoslavio (JES, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 22-25: **Renkontiĝo de Handikapitaj Esperantistoj**, Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio (Josef Vaněček, Soukenická 58, CS-274 01 Slaný)
- 23-25: **Jarmeza Esperantista Semajnfino**, Markkleeberg (Leipzig), Germana DR (Kulturbund der DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-7010 Leipzig; temo "Panon por ĉiuj havas la tero")
- 23-25: **Renkontiĝo de Adriatikaj Esperantistoj**, Split, Jugoslavio (E-Societo Split, "Bratstvo i jedinstvo", P.P. 158, YU-58000 Split)
- 24-25: **E-Pacmarŝo al Ležáky**, Pardubice, Ĉeĥoslovakio (Milada Hemerková, J. Wolkerova 2071, CS-530 02 Pardubice)
- 29-12: **Internacia Esperanto-Renkontiĝo**, Ŝumen, Bulgario (E-Societo "Vekiĝo", Pk. 66, BG-9700 Ŝumen)
- 30-02: **Someraj Tagoj '89 de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo**, Mariehamn (Alando), Finnlando (Anna Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, SF-20720 Åbo)

LERNU PER ESPERANTO — *PRI:*

- **Hungario** – historio, lingvo, kulturo, ekonomio, sciencoj (Debrecen, 22 julio-19 aŭgusto)
- **Ĉinaj kulturaj artoj** (Yangling, vd. dorskovrilan anoncon)
- **japanaj kulturaj artoj** (Kameoka, vd. februaran anoncon)
- **trafiko** – la fervojo kaj aliaj teknikoj, ekonomio, rilato kun la vivmedio (SAEST, Strážnice, 7-9 julio)
- **akupunkturo** (Pekino, 20 julio-8 aŭgusto)
- **esperantologio** (Varsovio, 27 aprilo-1 majo; Veliko Tarnovo, 15-20 julio)
- **terminologio** (Poprad, 12-21 junio)
- **instru-metodiko** (Poprad, 26-30 aprilo; La Chaux-de-Fonds, 10-22 julio)
- **komputiko** (La Chaux-de-Fonds, 28 aŭgusto-2 septembro)

kaj pri multaj aliaj temoj – studu atente la Kalendaron kaj petu detalajn programojn de la Esperanto-centroj!

julio

- 01-08: **Internacia Velsemajno**, Ejsellago kaj Vadomaro, Nederlando (Willemien Dorleijn, Bolderikamp 196, NL-2353 GZ Leiderdorp; antaŭpago de 150 gld. al ĝirkonto 28391, "Esperanto-Voorlichting FLE" en Leiderdorp, NL)
- 01-09: **1-a Internacia Perbicikla Feriado**, Órészentpéter (Őrség), Hungario (Erő Csizsár, Kulich Gyula u. 25 v/16, H-8100 Várpalota)
- 01-10: **Somera Esperanto-Lernejo**, Stambulčić, Jugoslavio (SEL, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 01-21: **Internaciaj Esperanto-Kursoj**, Pisanica, Bulgario (IEK, adreso supre)

- 02-07: **Somera Esperanto-Kurso**, Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF-40630 Jyväskylä)
- 02-09: **1-a Renkontiĝo de Alpoj-Adria Regiono**, Zadar, Jugoslavio (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 02-15: **Somera Esperanto-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-Klubo, CS-674 01 Třebíč)
- 02-15: **Somera Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia Esperanto-Asocio, Internacia Kleriga Centro, Sobotské nam. 6, CS-058 01 Poprad)
- 02-17: **Prelegoj kaj kursoj okaze de la ducentjara datreveno de la Franca Revolucio**, Kastelo Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 03-07: **Someraj kursoj**, Karlskoga Popolaltlernejo, Svedio (Pf. 192, S-69124 Karlskoga)
- 03-09: **Internacia KISO**, Hamburg, FR Germanio (GEJ, Rheinweg 15, D-5300 Bonn)
- 03-21: **20-a Somera Kursaro**, San Francisco State University, Kalifornio, Usono (Esperanto Information Center, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010)
- 07-09: **Seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko"**, Strážnice, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, SAEST 1989, Jilská 10, CS-110-01 Praha 1; temo "Trafiko"; limdato 31 majo)
- 07-14: **Internacia Esperanto-Lingvotendaro**, Kiliántelep, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)
- 08-14: **Internacia Junulara Semajno**, Szolnok, Hungario (Szilvási László, Lingvo-Studio, Pk. 87, H-1675 Budapest)
- 10-22: **2-a Intensiva Pedagogia-Metodika Kurso de UEA-ILEI**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 12-22: **Internacia Renkontiĝo de Freinet-instruistoj**, Ste. Foy-la-Grande, Francio (Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F-37540 St. Cyr-sur-Loire)
- 13-23: **Feriado por nebene vidantaj infanoj**, Leek, Anglio (W.H. Simcock, Clayton House, Butterson, Leek, Staffs, Britio ST13 7SR)
- 14-24: **Esperantista Ŝak-Festivalo**, Targovište, Bulgario (E-Societo "Amikeco", Pk. 174, BG-7700 Targovište)
- 15-24: **22-a Internacia Renkontiĝo Naturamika**, Abaliget, Hungario (Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 15-20: **7-a Internacia Somera Esperanto-Universitato**, Veliko Tarnovo, Bulgario (Esperantista Societo "Lumo", Pk. 121, BG-5000 Veliko Tarnovo)
- 15-21: **Turisma Semajno '89**, Slovaka Paradizo, Ĉeĥoslovakio (Peter Pavúk, Jilemnického 17, CS-052 01 Spišská Nová Ves)
- 15-24: **22-a Internacia Renkonto Esperantista Naturamika**, Abaliget (Pécs), Hungario (Baranya-Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 15-29: **"Ŝumava-montaro en selo" (por biciklistoj)**, Filipova Hut (Kvilda), Ĉeĥoslovakio (Miroslav Tenčl, Všeřdova 6, CS-118 01 Praha 1)
- 16-23: **45-a Internacia Junulara Kongreso**, Kerkrade, Nederlando (TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; temo "Transporto")
- 16-29: **Somera Esperanto-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-Klubo, CS-674 01 Třebíč)
- 16-29: **Somera Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia Esperanto-Asocio, Internacia Kleriga Centro, Sobotské nam. 6, CS-058 01 Poprad)
- 17-22: **49-a Hispana Kongreso de Esperanto**, Bilbao, Hispanio (LKK, Barrencalle Barrena 7-1, E-48005 Bilbao)
- 17-22: **Seminario "Paul Klee kaj Le Corbusier: svisaj motoroj de la nuntempa arto"**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 17-29: **Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 18-31: **"Lernu kaj praktiku"**, Kastelo Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 20-23: **49-a Argentina Kongreso de Esperanto**, P.R. Sáenz Peña, Argentino (LKK, Urquiza [6] n-ro 1230, RA-3700 P.R. Sáenz Peña [Chaco]; temo "Kiel agadi dum la 2-a jarcento")
- 21-09 aŭgusto: **Internaciaj Esperanto-Kursoj**, Pisanica, Bulgario (IEK, adreso supre)

- 22-27: **ELNA-Kongreso**, Ĉikago, Ilinojso, Usono (ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 22-29: **7-a Ekumena Kristana Kongreso**, Annan Court (Uckfield), Anglio (Kristana Kongreso 1989, 121 Limpsfield Road, Sanderstead, Surrey, Britio CR2 9LF)
- 22-29: **Pariza Freneza Semajno**, Francio (Unuiĝo Franca por Esperanto [Turisma Servo], 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 22-19: **Hungara Somera Universitato**, ŝtata Universitato "Kossuth Lajos", Debrecen, Hungario (prof. István Pálffy, Kossuth Lajos Tudományegyetem, H-4010 Debrecen)
- 24-29: **Seminario "Zamenhof kaj Privat, gvidantoj de nia movado"**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 29-04: **11-aj Turismaj Tagoj**, Žilina, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-Klubo, Pk. 3152, CS-010 42 Žilina)
- 29-05: **74-a Universala Kongreso de Esperanto**, Brajtono, Anglio (Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; temo "Lingvo kaj egaleco en internaciaj rilatoj")
- 30-12: **Somera Esperanto-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-Klubo, CS-674 01 Třebíč)
- 30-12: **Somera Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia Esperanto-Asocio), Internacia Kleriga Centro, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad)

aŭgusto

- Internaciaj junularaj labortendaroj en Bulgario** (Pk. 303, BG-8000 Burgas; str. "C. Cerkovski" 14, BG-5800 Pleven)
- 01-14: **"Omaĝo al Edmond Privat" kaj kursoj**, Kastelo Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 02-08: **Somera Esperanto-Lernejo**, Tata, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)
- 05-12: **62-a SAT-Kongreso**, Illertissen, FR Germanio (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 ave. Gambetta, F-75020 Paris, Francio)
- 05-12: **23-a Internacia Kongreso de ILEI**, Caerleon, Kimrio (A. Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, HR6 8QD Britio; temo "Motivado en la lerneja instruado de Esperanto")
- 05-12: **57-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**, Brajtono, Britio (John Wells, 58 South Drive, Charltonville, Manchester M21 2FB)
- 05-12: **11-a Tradicia Renkonto de Esperantistaj Familioj**, Hungario (József Horváth, Vajcsuk u. 20, H-9024 Győr)
- 06-15: **Somera Esperanto-Kurso en Lingvolaboratorio**, Szombathely, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)
- 06-26: **1-a Bjalistoka Esperanto-Laborbrigado**, Bjalistoko, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP FUW, ul. M. Curie-Skłodowskiej 14/701, PL-15-097 Białystok)
- 07-12: **Seminario "Stilaj kaj verkaj ekzercoj kun Johán Valano"**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 08-14: **Somera Esperanto-Lernejo**, Eger, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)

- 10-29: **Internaciaj Esperanto-Kursoj**, Pisanica, Bulgario (IEK, adreso supre)
- 12-19: **TANEF-Feriosemajno (naturamikoj)**, Bodmann (Lago Konstanco), FR Germanio (Lothar Eckert, Im Kirchspitzen 4, D-7552 Durmersheim)
- 14-19: **8-a Internacia Literatura Forumo: "La fenomeno Edmond Privat"**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 14-28: **Somera Lernejo**, Kastelo Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 15-21: **Somera Esperanto-Lernejo por Pedagogoj**, Eger, Hungario (Esperanto-sekcio de Express, adreso supre)
- 15-30: **Internacia Danuba Remado**, Vicin-Silistra, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, bul. Āristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario)
- 17-21: **1-a Internacia Esperanta Tablotenis-Konkurso**, Hungario (Csongrád-Komitato de HEA, Pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely)
- 17-30: **25-a Jubilea Esperantista Feriado (Parto 1 - "Esperanto hejme")**, Międzygórze, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, Pk. 16, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wrocław 17)
- 19-26: **Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro**, Feldberg, Germana DR (Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, DDR-2000 Neubrandenburg)
- 19-27: **1-a Internacia Renkontiĝo de E-Invalidoj**, Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio (Sekcio de E-invalidoj, Pk. 63, CS-274 01 Slany)
- 21-26: **Seminario "Lertiĝo en la tradukarto, el la franca"**, KCE, Svislando (adreso supre)
- 21-oktobro 13: **8-semajna kurso por komencantoj**, Karskoga Popola Altlernejo, Svedio (Karskoga folkhögskola, S-691 24 Karskoga)
- 23-27: **Internacia konferenco de Komunista Esperantista Kolektivo**, Ruse, Bulgario (KEK, Pk. 25, BG-1309 Sofia)
- 25-28: **Festotagoj omaĝe al la dudekjariĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Havířov, Ĉeĥoslovakio (ĈES, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1)
- 25-31: **22-a Pupteatra Internacia Festivalo**, Zagreb, Jugoslavio (IKS, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)
- 25-31: **Internacia Konferenco: "Kiel reteni en la movado komencantojn kiuj lernis la bazan Esperanton?"** (sama adreso kiel PIF, supre)
- 26-02: **60-a Itala Kongreso de Esperanto**, Bergamo, Italio (IEF, via Villoresi 38, I-20143 Milano; temo "Horizonto '92")
- 26-04: **6-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 6)**, San Marino (Sekretario de AIS, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio)
- 27-03: **11-a Somera Studenta Esperanto-Renkonto**, Toruń, Pollando (Esperanto, RU ZSP UMR, ul. Moniuszki 10/20, PL-87-100 Toruń; samtempe okazos TEJO/PSEK-seminario "Lingva kaj movada edukado")
- 28-02: **Seminario "Komputoroj en la servo de interlingvistiko"**, KCE, Svislando (adreso supre)

LA KVINPETALO internacia stagejo de LF-koop

respondekas: Suzanne Bourot
administras: Societo Yvonne Martinot
pĉk Limoges 2408-62 H



route de Civeaux
F-86410 Bouresse (Francio)
tel. +33-49-428074

*Bouresse: ĝis 1983 nur eta kampara vilaĝo (619 loĝantoj)
35 kilometrojn sud-oriente de la franca urbo Poitiers,
en la agrable suna verdo de vasta franca ebenaĵo,
ornamita de dolĉaj deklivoj, mildaj riveroj kaj trankvilaj lagoj,
kiuj svatas la Loire-valon kaj ties kastelojn,
sed samtempe koketas kun la Centra Montaro . . .*

*En tia idilia vilaĝo ekde 1984 ŝosis la Kvinpetala projekto de LF-koop,
danke al la mecenateco de la forpasinta kooperantino Yvonne Martinot
kaj al la persistemo de la francaj kunlaborantoj, unuavice Suzanne Bourot.
En tri (sed laŭplane iam kvin) negrandaj sed komfortaj domoj
dum tri jaroj ni eksperimentis la eblojn de la loko kiel internacia stagejo: . . .*

*Esperantio bezonas redaktistojn, instruistojn, publikrilatajn aktivulojn . . .
organizantojn de kongresoj, grafikistojn, animantojn de kantovesperoj . . .
aktorojn, prelegantojn, prezidantojn de asembleo, protokolistojn . . .*

*La Kvinpetalo estas ideala, malmultekosta ejo preta por tiu celo:
iom post iom ĝi gastigos kursojn por prepari tiajn aktivulojn;
iom post iom ĝi fariĝos la rendevua punkto por prilaborado de projektoj;
iom post iom ĝi funkcios kiel studa kaj ripoza centro.*

*Bonvolu peti de la respondeculino la programon kaj la tarifojn de ĉi tiu jaro;
sendu proponojn, ideojn, informojn, sugestojn por plenumi la diritan celon;
vizitu la stagejon, eĉ se ne okazas staĝo: vi plezurigos la Kvinpetalanojn!*

Kongresa Komunikilo



**74-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Brajtono (Brighton), Anglio,
29 julio-5 aŭgusto 1989**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Esperanto-Asocio de Britujo,
140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio**

Antaŭkongreso kaj Solena Lanĉo: Aliĝintoj al la Antaŭkongreso havos la okazon spekti kaj mem provi tradiciajn britajn popoldancojn, vidi ĉefajn famaĵojn de Londono dum aŭtobusa traŭba ekskurso kun ĉiĉerono, kaj partopreni altrangan solenaĵon kun riĉa regalo en la urbodomo Guildhall. La solenaĵon partoprenos eminentaj invititoj de la kongresa lando, eksterlandaj diplomatoj, kaj movadaj gravuloj. Multaj kongresanoj jam mendis, sed restas iom da lokoj. La Antaŭkongreso kaj la Solena Lanĉo estas esencaj partoj de la Kongreso kaj bona enkonduko al la UK. Estas organizita ankaŭ grupa aŭtobusa veturo al Brajtono.

Aliĝoj: Jam aliĝis pli ol 1500 kongresanoj el ĉ. 54 landoj de ĉiuj mondopartoj. Multaj el ili aliĝis ankaŭ al postkongresoj en Irlando, Kimrio kaj Skotlando.

La postkongresoj: Aparte multaj mendas la Oficialan Postkongreson en Irlando, kiu estos unu el la plej gravaj internaciaj movadaj okazaĵoj en Irlando ĝis nun. Tamen Skotlando kaj Kimrio estas ankaŭ allogaj por multaj kongresanoj. Lokaj esperantistoj preparas sin por digne gastigi la postkongresantojn. La partoprenantoj de la kimra kurso dum la UK havos la okazon provi la akiritan scion kaj senti la vivon de tiu lingvo.

Pitoreska irlanda haveno atendas postkongresanojn.



Programo: La UK organizas pli da aktivadoj por novaj kongresanoj, neesperantistoj, komencantoj, kaj familianoj de kongresanoj. Krom la tradiciaj Cseh-kursoj, okazos ankaŭ kursoj laŭ la zagreba metodo, konversaciaj rondoj, progresigaj kursoj, kunveno por novaj kongresanoj, kaj simile. Aliaj proponoj ĉi-rilataj estas bonvenaj.

Tago de la Paco: La ĉeftemo de la Tago de la Paco estas "Esperanto kiel ilo de pripaca edukado". Ankaŭ por konkretigi la rezolucion de la lasta Tago de la Paco dum la roterdama UK en 1988, ni kunvokas la konsciajn esperantistojn por kune diskuti pri fondo de aparta celgrupo por mediprotektado kaj gardado de socia justeco.

Referantoj pri la supra temo rajtos paroli dum maksimume dek minutoj kun aktualaj labormetodoj kaj rezultoj. Aparte bonvenaj estas prezentaĵoj en formo de drametoj, sonbendoj, vidbendoj kaj lumbildoj, laŭ kiuj oni vive montras la utilecon de Esperanto kiel edukilo pri pacaj temoj. Porpacaj kantoj kaj ĥoroj kun muzikistoj estas kore atendataj. La interesitoj tuj kontaktu la ĉeforganizanton: s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tokio 153 Japanio. La resumo de la roterdama Tago de la Paco estas havebla ĉe la konstanta adreso de la UK.

Inter-Religia Kunveno Esperantista: La IRKE en Brajtono invitas la reprezentantojn de diversaj esperantistaj religiaj organizaĵoj prezenti siajn praktikajn aspektojn de la komuna temo, "La eduka rolo de la religio en la familio". La referaĵon prefere akompanu dokumentoj ilustrantaj la temon laŭ difinitaj religiaj konceptoj kaj praktikoj. La interesitoj bonvolu kontakti la kunordiganton pere de la konstanta adreso.

Arta programo: Aparte altnivela ŝajnas esti la teatra programo. Oni antaŭvidas du teatraĵojn de anglalingvaj aŭtoroj, *Kiel amas la alia duono* de A. Ayckbourn kaj *Kato sur arda lada tegmento* de T. Williams, kaj la faman *La eta princo* de A. de Saint-Exupéry, dramigitan kaj ludotan de la pola aktorino Barbara Lukaszewska. Estos ankaŭ altnivelaj muzikaj prezentoj.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estis ekspedita fine de februaro. Temas pri broŝuro 40-paĝa, plaĉe ilustrita. En ĝi troviĝas ĉiuj gravaj informoj kaj instrukcioj, kaj kune kun ĝi oni sendas la mendilon por ĉiuj kongresaj aranĝoj.

Loĝado: Estas ankoraŭ sufiĉe da lokoj en ĉiuj loĝkategorioj. Oni bonvolu konsideri ke lokoj ĉe Politekniko estas rezervitaj unuavice por kongresanoj el netranspagipovaj landoj. Kongresanoj el aliaj landoj prefere ne mendu tiujn lokojn, ĉar la loĝiga situacio ne promesas plenumon de tiuj mendoj. Mendante oni ne forgesu indiki alternativajn loĝkategoriojn.

Amasloĝejo: Tiu estas antaŭvidita por la junularo; aliaj kongresanoj ne mendu ĝin. Junaj mendantoj konsideru la kondiĉojn menciitajn en la Dua Bulteno.

Pagoj: Bonvolu konsideri la limdatojn por pagoj, difinitajn en la Dua Bulteno. Pro striktaj kontraktoj kun la loĝigaj instancoj, la Kongreso devas relative frue antaŭpagi. La kongresanoj kiuj pagas post la limdatoj riskas neplenumon de siaj mendoj.

Samtempe, ni volonte akceptu kaj forte subtenu la konkretan proponon, kiun faris la “Tago de la Paco” al la Komitato de UEA en Roterdamo, 1988, nome fondi apartan celgrupon inter esperantistoj ĝenerale kaj komisionon ene de UEA specife, kiu kune kun la samcelaj institucioj kaj grupoj antaŭenigu la kampanjon por mediprotektado kaj gardado de socia justeco, utiligante la lingvon internacian kiel interkomunikilon.

Ne mankas ideoj

- kasedo de mallongaj kantoj por komencantoj
- kurso por ĉinaj infanoj inkluzive de taŭgaj lernolibroj
- kurso por infanoj en publikaj lernejoj en Usono

La transitiveco de verboj en Esperanto

Mi ne ĉiam samopinias kun Bernard Golden, sed kun lia artikolo en *Esperanto* de novembro 1988 (n-ro 995/11) mi tute konsentas.

Antaŭ kelke da tempo, dum mia redaktado de *Aŭstralia antologio*, kiam mi ofte renkontis misuzon de iuj verboj eĉ ĉe spertaj esperantistoj, mi mem intencis verki tian artikolon, sed tiam mi ne havis la tempon. Nun, ŝajne, Bernard Golden frapis la unua, se tiel diri . . . !

Mi faris liston de la ĉefaj ĝenaj verboj, jene:

Transitivaj:

aplik	komenc	sku
balanc	komuniki	streĉ
ban	kuir	sufok
bukl	mezur	sving
ĉagren	montr	ŝanĝ
etend	mov	ŝir
fend	paŝt	tren
ferm	renkont	turn
fin	renvers	vek
fleks	romp	verŝ
klin	rul	vind
kolekt		

Netransitivaj:

bol	glit	son
brul	halt	sonor
ĉes	komunikiĝi	star
daŭr	kresk	ŝpruc
degel	krev	ŝrump
dron	lum	ŝvel
eksplod	odor	velk
evolu	pas	
funkci	pend	

Pri ĉi tiaj verboj, kiuj kaŭzas pli da problemoj al esperantistoj ol iu ajn alia aspekto de la lingvo, *Plena analiza gramatiko de Esperanto* diras (§119A): "La diferenco inter tiuj du subkategorioj estas tre grava en Esperanto, ĉar, kontraŭe al multaj lingvoj, unu verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, konservante la saman sencon; transitiva verbo povas netransitivigi nur helpe de sufiksoido (iĝ); kaj same nur helpe de afikso (ig, um, pri) povas transitivigi netransitiva verbo.... Rim. I. Sola escepto estas *fumi* (la *cigaro fumas: mi fumas la cigaron*)."

La aŭtoroj do ŝajne trovas tion *avantaĝo*, anstataŭ tio, kio ĝi vere estas: *malavantaĝo* kaj granda *malfacilaĵo*.

Plue, *fumi* NE estas la sola escepto. Jen kelkaj aliaj:

afekti:	(t) drinkulon
	(nt) antaŭ la spegulo
bati:	(t) hundon
	(nt) Ho mia kor', ne batu maltrankvile (Z)
blovi:	(t) trumpeton, teon. Mi blovis al li fumon (Z)
	(nt) La vento blovas
cedi:	(t) lokon
	(nt) al deziro. La neĝo cedis sub miaj piedoj
dolori:	(t) La vundo doloris min
	(nt) Mia koro doloras. Mi dolorigis al mi la piedon

venĝi:	(t) amikon
	(nt) li terure venĝos

Pri aliaj, la uzado ne estas certa, almenaŭ laŭ la vortaristoj (vidu Referencojn ĉe la fino de ĉi tiu artikolo):

paradi:	(t) sian eruditecon (B, M, W)
	(nt) en nova kostumo (B, F/L, M, PIV, W)
perpleksi:	(t) (B, F/L)
	(nt) (B, PIV, W)
rimi:	(t) (F/L, M, PIV, W, Z)
	(nt) (B, G-M)
sulki:	(t) sulki la frunton (PIV)
	(nt) sulkigi la frunton (B, F/L, G-M, W)

Kion do fari?

Miaopinie, ĉar nia lingvo *jam* havas verbojn kiuj apartenas al ambaŭ kategorioj, kiel menciite supre, la plej simpla solvo de ĉi tiu problemo estus, ke ni *toleru* la uzon de ĉi tiuj grupoj da verboj senŝanĝe, kaj transitive kaj netransitive laŭ la okazo, kondiĉe ke la kunteksto klare montru la sencon (iom simile al la Tolérances de la Franca Akademio).

Ekzemple, kiel oni povus miskompreni la sekvajn frazojn?

Ne bolu la akvon ĝis ĝi forbolos!

La instruisto komencis la lecionon. La leciono komencis.

Li fermis la pordon. La pordo subite fermis post li.

Ŝi banas la bebon. Li banis en la rivero.

Oni tiel faras en pluraj lingvoj sen ia miskompreno, ekzemple:

(angle) *Don't boil the water till it boils away.*

(france) *La leçon commença (continua). Il commença (continua) la leçon.*

(germane) *Das Wasser kocht. Sie kocht die Eier.*

Plue, tia uzado konformas al la principo de *neceso kaj sufiĉo*, pri kiu la Akademio de Esperanto skribis, ke ĝi "estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto," kaj "se la ideo tiamaniere esprimita estas bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, *tiu ĉi sufikso povas esti elĵetita kiel neutila kaj nenecesa*." (Oficiala Gazeto, majo 1913, citita en *Enciklopedio de Esperanto*, p. 383)

Nu, ni ekrulis la pilkon. Ĝi daŭru ruli!

Alan Towsey (Aŭstralio)

REFERENCJOJ

B: Butler: *Esperanto-English Dictionary* (Esperanto-angla vortaro)

F/L: Fulcher kaj Long: *English-Esperanto Dictionary* (Angla-Esperanta vortaro)

G-M: Grosjean-Maupin: *Dictionnaire complet espéranto-français* (Plena vortaro Esperanto-franca)

M: Millidge: *Esperanto-English Dictionary* (Esperanto-angla vortaro)

PIV: *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*

W: Wells: *Esperanto and English Dictionary* (Esperanto-angla/angla-Esperanta vortaro)

Z: Uzita de Zamenhof

Ĉu signifa termino?

La ĉefa punkto notinda rilate la uzon de verboj en Esperanto estas la preciza signifo de la verboj. Ĉu la verbo estas transitiva aŭ ne estas demando, kiun preciza scio de ĝia signifo klarigos. La malfacilo, kiun tiom da esperantistoj trovas, estas kulpo de la nacia lingvo, ne de Esperanto. En naciaj lingvoj, precipe la angla, la aktiva formo de verbo ofte estas uzata por doni kaj aktivan kaj pasivan signifon. Alivorte, la verbo havas du rilatajn sed nesamajn signifojn, kaj do oni devas lerni kiun el tiuj du signifoj la Esperanta verbo havas. Tio ne estas tute facila, ĉar en tiaj okazoj la nacia lingvo estas tro dubsenca por doni facile la necesan informon. Oni povas plej facile doni la informon per taŭgaj frazoj. Ekzemple, se oni ĵetas katon en la maron oni dronigas la katon kaj la kato dronas. Memevidente estas grava diferenco inter la du verboj. En la angla lingvo, tamen, ambaŭ havas la saman formon. Unu estas transitiva kaj la alia ne-transitiva, sed tio ne estas la grava punkto.

Oni devus ankaŭ konscii, ke la gramatiko de Esperanto ne estas precize tia sama, kiaj la gramatikoj de naciaj lingvoj (kiuj, cetere, diferencas inter si mem). La baza strukturo de Esperanto estas tia, ke verbo estas ligata senpere al sia subjekto, sed aliaj substantivoj kaj pronomoj devas esti ligataj al la verbo aŭ per prepozicioj aŭ per uzo de la akuzativa finaĵo *-n*. Ofte la du, prepozicio aŭ *-n*, estas interŝanĝeblaj, kaj do oni povas rigardi *-n* kiel postpozicion, t.e. kvazaŭprepozicio kiu sekvas la substantivon anstataŭ antaŭiri ĝin, anstataŭ kiel gramatikan kazan finaĵon. Oni povas diri aŭ “mi dankas vin” aŭ “mi dankas al vi”, “mi rigardas vin” aŭ “mi rigardas al vi”.

En la du ekzemploj supre la demando, ĉu la verbo estas aŭ ne estas transitiva, fariĝas gramatika bagatelaĵo. En aliaj okazoj oni povus longe argumenti. Se oni diras “ni alproksimiĝas Londonon” (anstataŭ “al Londono”), ĉu *alproksimiĝas* estas transitiva? Ĉu *Londonon* estas rekta objekto, aŭ ekzemplo de akuzativo de movado? Kaj ĉu gravas? Oni povas argumenti, ke Londono estas tio, kion oni eniros fine, kaj kion oni nun alproksimiĝas. Tiukaze, *alproksimiĝas* kaj *eniras* estas transitivaj verboj, kaj multaj homoj ne akceptus tion. Aliflanke, oni povas sugesti, ke transitiveco kaj netransitiveco ne estas signifaj terminoj en la kadro de Esperanto: la ĉefa afero estas, ke la finaĵo *-n* ligas *Londono* al la verbo *alproksimiĝas*.

Tiaj argumentoj, kvankam eble interesaj por spertuloj, povas kaŭzi konfuzon kaj eĉ konsternon por nespertuloj. Do, oni devas reveni al la konsilo, ke la lernanto – kaj la progresinto – lernu la precizan signifon de ĉiu verbo, kaj uzu transitivecon kaj netransitivecon nur kiel apogilon por helpi kontraŭ la dubsencaj klarigoj en la nacia lingvo.

Norman Lock (Britio)

Se vi aĉetis porkidon . . .

. . . ne plendu, ke ĝia vosteto spiralas. Per ĉi tiu ŝerca tezo amike admonis min antaŭ jarcento-kvarono d-ro Tomás Pumpr, aka-demiano. Nome, li estis rimarkinta, ke mi provis ĉiel rekonstrui propozicion, por ke malaperu pluralfinaĵoj, kiuj ne tre plaĉis al mi en Esperanto.

La tezo revenis en mian kapon post tralego de la goldenaĵo. . . . Esperanto ja estas lingvo aposteriora, t.e. ĉerpanta sian leksikon el etnaj fontolingvoj same “mankhavaj”. . . . Nu, se ni jam aĉetis “apostorian porkidon”, restas al ni solaj du vojoj: aŭ parkerigi la signifojn de la radikoj, aŭ dediĉi iom da tempo al etimologio kaj semantiko, kiuj instruos nin pli sisteme ol, ekzemple, PIV.

Permesu mencion de unusola radiko adjektiva: *integr/a*. PIV registras – kurioze – ankaŭ radikon verban: *integr/i* (tr). Tio ŝajnas al mi esti kontraŭa ne nur al la logiko, sed ankaŭ al la kutima verbigo de adjektivoj. *Integri* ja devus signifi nenion alian ol “esti integra”, dum *integrigi* signifus “fari integra”. (Por la nocio matematika, prof. Reiersøl tute prave proponis la verbon *integrali* (PIV-suplemento), derivitan el la substantiva radiko de Zamenhof.)

Dubanto, ĉu *integr-* estas *vere* radiko adjektiva, bonvolu konsulti vortaron latinan: *integer*, *-gra*, *-grum* devenas el la prefikso *in-* = *ne*, kaj la verbo *tangere* = *tuŝi*. Do, *sentuŝa*, *maltuŝa* (ne *netuŝita*, por kio latino havas la particon *intactus*, *-a*, *-um*).

Resume: La “hereza propono” de Golden, ekz. “Mi brulis la lignon”, fakte sankcius arbitran perfortadon, eĉ detruadon de la semantemoj prenitaj el etnaj fontolingvoj. Ĉu per tiaspeca ĥaosigo Esperanto fariĝus pli facile lernebla?

J. Kavka (Ĉeĥoslovakio)

Kroniko de la Akademio

De pluraj flankoj venis petoj, ke la Akademio informu pri sia agado. Nu, antaŭ pluraj monatoj estis kreita internacia asocio “La Amikoj de l’ Akademio de Esperanto”. Dank’ al la rajtoj de tiu asocio ni povas publikigi kvaronjaran informilon *La letero de l’ Akademio*, kiu jam en sia dua jaro pritraktas nur lingvajn kaj akademiajn temojn.

Plie la asocio ebligas helpi ĉiamaniere la Akademion: ne nur finance, sed ankaŭ materiale. Membroj de la asocio estas foje vokitaj por kontroli voĉdonojn kaj povos esti vokitaj ankaŭ por organizi specialajn renkontojn aŭ kunhelpi en la sekretaria laboro de la informilo.

Asocio laŭleĝe internacia ebligas antaŭvidi multajn aliajn aktivaĵojn laŭ la nombro de aliĝantoj, kiuj bonvolos faciligi la laboron: ekzemple povos esti kroniko sur radio-ondoj. Ankaŭ ĉi tiu kroniko povos aperi de temp’ al tempo, se montriĝos intereso ĉe la legantoj de *Esperanto*.

Dum la pasintaj ses jaroj intensiĝis la interna aktiveco de la Akademio, kaj baldaŭ post studado venos la aferoj al siaj naturaj konkludoj: ja pri la Komuna Vortaro, la Teknika Vortaro, kaj la Gramatiko tiuj konkludoj amasiĝas.

d-ro André Albault
prezidanto de la Akademio

“La Amikoj de l’ Akademio de Esperanto” (A.AdE)
Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio: akad-s
Perantoj en diversaj landoj
Poŝtĉekkonto (A.AdE): 735 27 B Paris

Sekretario: André Bourdeaux
E 184, rue de la Chapelle, F-75018 Paris, Francio
Kasisto: Jean Thierry
5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio

Parlamentanoj mem spertas la lingvajn barojn

La fascinan demandon, kial la Esperanto-movado tiel ofte indiferentas pri la eksteraj agadoj, eĉ kiam tiuj evidente utilis al ĝi, ni lasu al la estontaj sociologoj kaj historiistoj de la internacia lingvo. Pri la temo "parlamentara agado" vi trovos neniun kapvorton en *Enciklopedio de Esperanto*, nek en *Esperanto en perspektivo*. Kelkajn jarojn post esperplena komenco en 1972, la tiucela komisiono de UEA, en kiu ankaŭ mi laboris, ĉesis funkcii. Sed la premisoj de tiu agado restas daŭre validaj. En 1988 la Komitato kaj Estraro de UEA decidis rekomenci la parlamentan agadon kadre de la ankaŭ restarigita Komisiono por Eksteraj Rilatoj, kaj mi havis la honoron fariĝi la respondeca komisiito.

Verŝajne utilis resumi la strategion kaj celojn de tiu ĉi branĉo de la ekstera agado. Kiel montras la historiaj kaj praktikaj spertoj, pri la lingvopolitiko en- kaj eksterlanda de la diversaj ŝtatoj en la mondo decidas la politikistoj mem, helpate de lingvosciencaj ekspertoj. El tiuj politikistoj, plej facile alireblaj estas la parlamentanoj, kiuj ofte mem devenas de popolaj socitavoloj kaj malbone – aŭ tute ne – scias paroli fremdajn lingvojn. Ili do persone spertas la lingvajn barojn.

Jam delonge ekzistas parlamentanoj-esperantistoj en diversaj landoj de la mondo, foje tre aktive agantaj por Esperanto. En la lastaj jardekoj krome aperis, en kelkaj landoj, formalaj parlamentaj grupoj de simpatiantoj al Esperanto. Okazis fojfoje gravaj kampanjoj kaj elpaŝoj pri Esperanto ĉe la parlamentoj. Tamen la movado malmulte kunagis, kaj tiuj individuoj, grupoj kaj iniciatoj restis izolitaj kaj nur parte sukcesaj.

Okazaĵo en la jaro 1968 povas servi por illustri la potencialon kaj samtempe la problemojn de la parlamentara agado. Mi estis tiam prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kaj laŭ tute malrekta vojo el Danlando mi eksciis, ke en alvenonta dana parlamenta delegacio verŝajne estos esperantisto. Kiam precize venos la delegacio kaj kiu estas la esperantisto, tion oni ne indikis.

Eltrovinte la daton kaj lokon de la akcepto de la delegacio, mi disponis, pro la publikoforbata protokolo, nur unusolan, iom riskan eblon por kontakto. Kiam la gastoj alvenis al la atendantaj aŭtomobiloj, mi proksimiĝis kaj vokis, "Ĉu estas ĉi tie esperantisto inter la estimataj gastoj?" Tiam sinjorino eniranta jam la aŭton ekhaltis kaj diris, "Mi konas Esperanton. Kaj kiu vi estas, sinjoro? Ĉu mi povas helpi al vi?" Ŝia interparolo kun mi haltigis la tutan karavanon; iuj oficistoj alkuris kaj kriis ke mi ne malhelpu, sed ili videble ne kuraĝis ĝeni la sinjorinon.

Montriĝis poste, ĉe kunsido en ŝia hotelo, ke ŝi estas Meta Ditzel, prezidanto de la delegacio kaj ano de la gvidantaro de la Kamparana Partio en Danlando. Foje ŝi eĉ instruis Esperanton, kio klarigis ŝian eĉ surprize bonan regon de nia lingvo. Dum duonhora amikeca interparolo mi interkonsentis kun s-ino Ditzel kelkajn komunajn paŝojn por Esperanto dum ŝia vizito. Kaj la rezultoj estis brilaj. Dum tre multaj renkontoj kun plej eminentaj reprezentantoj de la polaj registaro kaj socio, ŝi tuŝis la

lingvo-problemon kaj Esperanton kiel ties solvon. En la edukministerio, la instruado de Esperanto okupis apartan lokon en la renkontiĝo kun la edukministro – prof. d-ro Henryk Jablonski, kiu mem junaĝe lernis Esperanton – kaj okazis tuta informkonferenco pri la Esperanto-instruado en Pollando, kies preponon mi mem sukcesis iniciati. Ĉar, laŭ la peto de s-ino Ditzel, la interpretado tie okazis en Esperanto, ni povis samtempe doni ege efikan lecionon al la neesperantistaj edukistoj pri la vera praktika funkciado de la lingvo.

El tiu vizito – hazarde sciita, lastmomente aranĝita – rezultis, ke aparta oficisto en la edukministerio estis komisiita okupiĝi pri la instruado de Esperanto en Pollando, kaj nur la nepreteco de PEA malhavigis konkretan ministerian subtenon por la edukado de E-instruistoj. Ekregis ĝenerale multe pli favora atmosfero por la solvado de diversaj niaj aferoj en la ministerio, kaj ankaŭ ĉe aliaj oficialaj institucioj kaj ties reprezentantoj. Kaj ĉion ĉi kaŭzis nur unu parlamentano, homo ne vaste konata en la internacia movado sed vere konvinkita esperantisto.

Ĉio, kion mi ĵus priskribis, estas nur unu aspekto de la parlamentara agado en la praktiko. Ĝiaj ĉeftaskoj estas, se paroli ĝenerale, nur du: profiti la konon kaj la subtenon de Esperanto flanke de parlamentanoj-esperantistoj, por disvastigo kaj firmigo de la ideo de la internacia lingvo; kaj servigi Esperanton al parlamentanoj en iliaj internaciaj kontaktoj. Ambaŭ agadoj konsistigas la plej rektan vojon por enkonduki diskuton pri la lingvo-problemo inter la decidantojn pri la lingvo-politiko, kaj



Ĉu s-roj Bengtsson (Svedio, maldekstre) kaj Malinowski (Pollando) fariĝos la unuaj membroj de Internacia Parlamentestra Esperanto-Grupo?

samtempe levas la socian prestiĝon de Esperanto. Sukcesa parlamentara agado samtempe influas pozitive la kunlaboron de la internacia Esperanto-movado – kaj speciale de UEA – en interŝtataj organizaĵoj kiel UN, Unesko, Monda Turisma Organizaĵo ktp. Kaj en la tiel nomata Tria Mondo, akirado de la subteno de parlamentanoj povas esti esenca faktoro por lanĉo kaj firmigo de la feblaj pioniraj movadoj.

Ne eblas en unu artikolo pritrakti ĉiujn aspektojn detale. Necesas krome plej vasta diskuto pri la jam prilaborita "Agadprogramo de la parlamentara agado de UEA" (ricevebla de mi)

kaj organizita internacia kunlaboro de aro da movadanoj, konsciaj kaj iom kompetentaj pri eksteraj rilatoj. Nur tiel ni povos garantii laŭplanecon kaj kontinuecon de la agado, kaj ke oni ne estu informata pri gravaj vizitoj – kiel mi antaŭ jaroj – private, ĉirkaŭvoje, malprecize kaj malfrue.

Kiel bazan organizan strukturon de la kunlaboro ni preparas jam nun Internacian Laborgrupon por la Parlamenta Agado. La grupanoj fiksis interkonsente siajn taskojn, konforme al sia persona kaj teritoria situacio. Ĉiu aktiva kunlaboremulo bonvolu kontakti min letere.

Jerzy Uśpieński
Komisiito pri Parlamenta Agado
str. Pereca 2 m 722
PL-00-849 Varsovio, Pollando

PLANADO

Profesiaj konsiloj en Belgio

Por la ellaboro de nova strategio, Flandra Esperanto-Ligo (FEL) organizis kunvenon sub la gvidado de neesperantistaj fakuloj pri merkato. Tial la kunveno escepte okazis en nacia lingvo.

Je la 8-a de oktobro kunvenis 26 reprezentantoj de lokaj grupoj en Flandrio kaj 4 reprezentantoj el Nederlando. La celo estis konkrete difinita:

- esplori kiel principoj de merkatisma aplikeblas al asocio;
- konatiĝo kun kelkaj teknikoj por pli efike labori;
- difino de niaj celgrupoj (ĉe kiaj homoj ni varbu);
- komuna elekto de unu konkreta projekto por realigo per la kunlaboro de kiom eble plej multe da Esperanto-klubo kaj asocioj.

En la mateno Hans Erasmus rakontis pri siaj ege pozitivaj spertoj en la ministerio pri mediprobleroj, post konsultado de organizaj konsilistoj. Li ankaŭ klarigis sian projekton pri komunikado en la Eŭropa Komunumo. Tiu projekto antaŭvidas la kunagadon de ĉiuj 12 landoj de la Komunumo por atingi televidan Esperanto-kurson en 1991 [vd. la januaran numeron, p. 4].

Poste Mirjam Smets kaj Luk Lammens, kiuj instruas la personaron respektive de asekur-kompanio kaj de banko, transprenis la gvidadon de la tago. Ili klarigis al ni, ke la principoj de merkato, validaj por komerca *servo* (la komerco de *varoj* estas ege diferenca!), grandparte validas por asocioj. Ili iniciatis diversajn ekzercojn, kiujn ili ne finis pro manko de tempo. Sed la partoprenantoj juĝis la sperton tiel interesa, ke ili konsentis daŭrigi la laborojn en aliaj tagoj. Unu el la premaj konstatoj de niaj gvidantoj ja estis, ke nia movado estas interne tro malforta kaj nekohera por iniciati nun ambiciajn projektojn por la ekstera mondo. Mi ŝokiĝis je tiu konstato. Mi ja scias ke en FEL, ni jam multe progresis rilate kunordigadon kaj harmoniigon de agadoj. Kiom necesa estas do nova agadpolitiko en landaj asocioj kun granda manko de kohereco!

Per propraj fortoj ni nun daŭrigos niajn laborojn por interne plifortiĝi. Ni kombinos tion kun praktika ellaborado de la necesaj preparoj por sukcese lanĉi la supre menciitan projekton de Hans Erasmus. En decida momento ni denove bezonos la konsilojn de fakuloj. Ĉio tio nepre necesas, ĉar nuntempe la publiko prijuĝas movadon ne laŭ ĝiaj belaj ideoj sed laŭ ĝiaj ekzemploj de bona funkciado.

Ni volonte sendos kopion de la detala protokolo pri tiu ĉi kunveno al interesatoj. Petu ĝin de FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ivo Durwael
Prezidanto de FEL

INFORMADO

Efika gazetara agado pere de komputoro

Ekde antaŭ du jaroj, Germana Esperanto-Junularo (GEJ) uzas komputoron en sia publika agado. Post gravaj Esperanto-kongresoj kaj -seminarioj GEJ-aktivuloj forsendas al la lokaj gazetoj en ĉiuj germanaj urboj, el kiuj venis la partoprenantoj, tiel nomatan *centran artikolon lokigitan*.

Tia artikolo konsistas el ĝenerala raporto pri la renkontiĝo, en kiun oni helpe de komputora programo por seriaj leteroj (ekz. "1st Mail") enmetas la respektivan adreson de la gazeto, la adreson kaj telefonnumeron de partoprenanto loĝanta en la urbo aŭ regiono kie la gazeto aperas, kaj krome plurfoje la loĝlokon de tiu partoprenanto. La artikolo estu ĉ. du paĝojn longa kaj povas komenci ekzemple per la vortoj: "Kun fortaj impulsoj kaj multaj ideoj por sia grupa vivo surloke, la partoprenantoj el . . . (*urbo*) ĵus revenis de la . . . (*aranĝo*). Poste sekvas la ĝenerala raporto, kaj eble en la mezo aŭ ĉe la fino denove iu loka rilato: "Precipe plaĉis al la partoprenantoj el . . . (*urbo*) la teatra vespero kaj la rokmuzika koncerto . . ."

Laŭ la ĝisnunaj spertoj ĉ. triono de la alskribitaj gazetoj aperigas la artikolon. Tio signifas, ke ekzemple pri la Internacia Seminario de GEJ aperas ĉiujare ĉ. 50 grandaj gazetartikoloj, krom tiuj kiuj aperas pro la sciigoj al la gazetaraj agentejoj.

La datenaro kun la adresoj de la gazetoj kaj partoprenantoj estas uzebla ankaŭ en la venonta tiuspeca kampanjo – do estas relative malgranda laborinvesto por realigi ĝin. Komputoroj taŭgaj por tio (ekzemple Atari 1040 ST, kiun jam dek GEJ-aktivuloj posedas kaj uzas ankaŭ por komposti la revuojn *GEJ-Gazeto* kaj *Koncize*) kostas kune kun ekrano kaj bona printilo jam malpli ol 2000 germanajn markojn.

Tamen laŭ mia scio GEJ estas ĝis nun la sola Esperanto-organizaĵo, kiu regule forsendas tian *centran artikolon lokigitan*. Espereble tiu ĉi instigo tion ŝanĝos. . . .

Ulrich Matthias (FR Germanio)

JUNULARO

El letero de Zlatko Tišljar (YU), kiu cetere emfazis la abundecon kaj popularecon de la sciencaj prelegoj ĉe la lasta IJK:

Pledo por regiona agado

. . . Necesas aparte akcenti ankoraŭ unu aspekton de la laboro de TEJO-kongreso. Temas pri du kunsidoj dediĉitaj al regiona kunlaboro, kiun TEJO kaj UEA ĝis nun neglektis. Tiel okazis aparta kunsido de kongresanoj el balkanaj landoj kiuj pridiskutis formojn de kunlaboro inter gejunuloj de Balkano. Krome, gejunuloj el regiono Alpoj-Adrio post du kunsidoj akceptis apartan deklaron, kiu – laŭ mia opinio – havas eĉ multe pli vastan signifon ol la invito al TEJO okupiĝi pli intense pri regiona agado. Mi kuraĝus diri ke tiu ĉi deklaro havas eĉ strategi-manifestan karakteron kaj devus esti konsiderata de tiuj kiuj preparas strategian planon por la dua jarcento de Esperanto. Tial indas diskonigi ĝin tra la mondo. Ĝia teksto troviĝas sur la sekva paĝo.

Laborgrupo por regiona agado "Alpoj-Adrio" dum la 44-a IJK de TEJO en Zagrebo en julio 1988 akceptis la jenan deklaron:

1.

Konsiderante la fakton ke la Esperanto-movado dum sia unujarcenta ekzisto evoluigis la lingvon Esperanton en la grado ke ĝi povas kontentigi ĉiujn civilizaciajn atingojn de la mondo, ke en la nuntempa mondo la progreson ĉiam pli difinas la informadik-teknologia evoluo, kaj ambaŭ tiuj faktoroj prezentas gravajn antaŭkondiĉojn por la paco en la mondo, la Kongresanoj

opinias ke en la tuja estonto necesas klopodi por plia integriĝado de la E-movado kun teknologi-informadikaj antaŭenmarŝoj.

2.

Konsiderante la ankoraŭ nekontentigan rapidecon per kiu evoluas la procezo de aplikado de Esperanto en internaciaj rilatoj de la homaro, la Kongresanoj

opinias ke necesas nova strategio kaj alistrukturiĝo de la movadaj celoj kaj organiziĝo, tiel ke la E-movado estonte pli energie klopodu priatenti la du jenajn celojn:

a) klopodi uzigi Esperanton kiel eble plej rapide en kiel eble plej multaj kampoj de la internacia homara aktivado, kaj

b) zorgi pri la propra kulturo kreata en la internacia lingvo kaj pluevoluigi ĝin.

Tio signifas ke ni ne rajtas memkontente vivi ene de la ekzistanta E-movado kaj ĝiaj institucioj (kion substrekis TEJO-deklaro ankoraŭ en 1969 en Tyresö) kaj aliflanke ni ankaŭ ne rajtas neglekti la ekzistantan E-socion kun ĝiaj internaj leĝoj (kion substrekis rezolucio en IJK en Rauma en 1980).

3.

Por pliaktivigi la ekzistantajn homfortojn pri kiuj la Movado disponas, necesas doni pli respondecan rolon al la junularo. Ni *invitas* ĉiujn Esperanto-instancojn elektadi en siajn estrarojn kaj gvidantarojn laŭeble multajn junajn esperantistojn.

4.

Por ebligi pli rapidan partneriĝon de la Movado kun teknologiaj kaj financaj fluoj ekstermovadaj ni *alvokas* ĉiujn E-Asociojn helpi, kunlabori kaj kunordigi sian laboron kun la diversaj profesiaj Esperanto-Centroj, kaj eventuale fondi novajn kie ekzistas kondiĉoj.

5.

Ni *petas* ĉiujn organizaĵojn kaj individuojn maksimume subteni kaj helpi la Movadon en Afriko kaj Azio, de kies antaŭenmarŝo dependas pli amasa tutmondiĝo de Esperanto.

6.

Ni *invitas* ĉiujn E-organizaĵojn organiziĝi laŭeble ankaŭ regione, ne nur lande (ekz. je la nivelo de: Mediteraneo, Alpoj-Adrio, Balkano, Sudameriko, Mezameriko, Nordameriko, Magrebo, Mezafriko, Sudazio ktp) formante regionajn komunajn laborprogramojn, organizante regionajn renkontiĝojn, kunsidojn, simpoziojn pri la problemo de lingva komunikado, junularajn konferencojn kaj renkontojn, sciencajn kaj fakajn kunvenojn, instigante diversajn agadojn kiujn la jam ekzistanta ŝtata kunlaboro tiunivela ankoraŭ ne aplikas.


7.

Ni *invitas* ĉiujn esperantistojn engaĝiĝi laŭ la propraj kapabloj kaj kondiĉoj por la scienca agado en siaj profesioj, speciale en la branĉoj informadika, lingvistika kaj pedagogia por vasta apliko de Esperanto en sciencoj aŭ almenaŭ fari kompilan, terminologian kaj aliajn teoriajn laborojn.

8.

Baze de la Rezolucio 11.11 el Sofio 1985 de UNESCO ni *invitas* ĉiujn E-Asociojn daŭre klopodi ĉe sialandaj lernejoj instancoj trovi vojon por laŭŝtupa enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj ni *rekomendas* por komenca unueca lernsistemo en la unua lernojaro uzi la Zagreban Metodon kiu ebligas maksimume rapidan parolkapablon kaj komunajn internaciajn kursojn ekde la komenco.

En Zagrebo, la 20-an de julio 1988



La Komitato de TEJO kunsidas en Zagrebo – sed la ideojn oni ankoraŭ proponas de ekster tiu oficiala organo.

LA MEMBRARO DE UEA en 1988

Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	0	3	3	Japanio	977	374	1351	Urugvajo	0	3	3
Alĝerio	0	5	5	Jugoslavio	985	238	1223	Usono	418	445	863
Andoro	0	1	1	Kamerunio	0	5	5	Vatikano	0	1	1
Angolo	0	1	1	Kanado	92	108	200	Venezuelo	0	27	27
Argentino	272	51	323	Kenjo	0	1	1	Vjetnamio	0	7	7
Aŭstralio	147	90	237	Kolombio	110	30	140	Zairio	148	23	171
Aŭstrio	255	55	310	Kongo	0	3	3	Zambio	0	1	1
Bangladeŝo	0	2	2	Korea Resp.	421	46	467	99 landoj	35945	7203	43148
Belgio	1024	271	1295	Kostariko	0	3	3				
Benino	0	5	5	Kubo	340	45	385				
Bocvano	0	1	1	Luksemburgio	96	10	106				
Bolivio	0	1	1	Madagaskaro	0	1	1				
Brazilo	101	376	477	Malajzio	0	3	3				
Britio	887	369	1256	Malto	45	9	54				
Bulgario	5110	104	5214	Maroko	0	1	1				
Centrafrika Resp.	0	4	4	Meksikio	4	16	20				
Ĉeĥoslovakio	3228	188	3416	Mongolio	0	2	2				
Ĉilio	21	10	31	Nederlando	415	458	873				
Ĉinio	1064	75	1139	Nepalo	0	12	12				
Danlando	208	104	312	Niĝerio	0	9	9				
Dominika Resp.	0	4	4	Niĝerlando	0	1	1				
Ebura Bordo	0	7	7	Nikaragvo	0	5	5				
Egiptio	0	1	1	Norvegio	336	88	424				
Ekvadoro	0	1	1	Nov-Zelando	59	65	124				
Filipinoj	0	2	2	Pakistano	0	10	10				
Finnlando	427	235	662	Papuo-Novgvineo	0	1	1				
Francio	534	684	1218	Peruo	15	6	21				
Gabono	0	1	1	Pollando	9385	205	9590				
Gano	0	4	4	Portugalio	132	26	158				
Germana DR	500	26	526	Ruando	0	6	6				
Germanio FR	996	524	1520	Rumanio	0	25	25				
Greklando	366	34	400	Senegalio	0	2	2				
Gujano	0	1	1	Sirio	0	1	1				
Gvatemalo	0	3	3	Sovetunio	0	109	109				
Haitio	0	2	2	Srilanko	0	6	6				
Hinda Unio	0	22	22	Sud-Afriko	57	22	79				
Hispanio	845	236	1081	Sudano	0	1	1				
Honkongo	0	6	6	Surinamo	0	1	1				
Hungario	3191	207	3398	Svazilando	0	2	2				
Indonezio	0	4	4	Svedio	914	369	1283				
Irano	0	107	107	Svislando	120	116	236				
Irlando	50	13	63	Tajlando	0	2	2				
Islando	53	44	97	Tanzanio	0	4	4				
Israelo	269	76	345	Togo	0	9	9				
Italio	1328	286	1614	Tunizio	0	3	3				
Jamajko	0	1	1	Turkio	0	6	6				

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1987 KAJ 1988

Kategorio	1987	1988
Membro-Gvidlibro	642	671
Membro-Jarlibro	1417	1344
Membro-Abonanto	3922	3817
Dumviva Membro	944	955
Honora Membro	30	34
Juna M-Jarlibro	192	223
Juna M-Abonanto	144	159
Individuaj Membroj	7291	7203
Aligitaj Membroj	27046	27638
Junaj Al. Membroj	9305	8307
Membroj entute	43642	43148
Societo Zamenhof	197	154
Abonoj <i>Esperanto</i>	265	257
Kolektivaj ab. <i>Eo</i>	1215	1022
Abonoj <i>Kontakto</i>	400	498
Kolektivaj ab. <i>Kto</i>	408	742
Patronoj de TEJO	59	50
Kotizoj entute	46186	45871

Stabileco ne sufiĉas

Komparo inter la membraroj de 1988 kaj 1987 montras statistike nesignifan ŝanĝon de malpli ol 1% en la sumaj membro-kategorioj. Ankaŭ ne okazis granda perturbo en ekvilibro inter diversaj kategorioj de membreco en diversaj landoj. Kiel ĉiam, la ciferoj apenaŭ spegulas la forton de la movado en ekzemple Brazilo, kie rolas ekonomiaj malfacilaĵoj, dum aliloke transpagaj maksimumoj tradukiĝas en limigitan membraron. Esti kongreslando denove esprimiĝis per kresko, kvankam tio ne garantias kontraŭ refalo.

La junularo plifortiĝis individue, sed okazis inter la aligitaj membroj granda trapaso de la aĝlimo en ekzemple Hungario, kio influas la proporcion. Kolektivaj abonoj al *Kontakto* tamen revastiĝis, ĉefe al afrikaj landoj. Tutmondecaj

traĵoj de la statistiko ankoraŭ grave ŝuldiĝas al Fondaĵo Canuto.

Registri eĉ malgrandan falon en nia membraro por 1988 povus timigi nin, ĉar sekvis plialtiĝo de la bazaj kotizoj por ĉi tiu jaro. Kaj ni ankoraŭ ne registras individuan membraron tiom pli grandan ol povis Hector Hodler jam en 1910. Ne ĉiu jaro devas esti rekorda, sed ni ne perdu la impeton de la Jubilea Jaro nun, kiam nova Strategia Plano akceptiĝos kaj freŝa Komitato elektiĝos en Brajtono. Malgraŭ sia alutimiĝo al longa perspektivo, la movado bezonas reteni sian urĝon, kaj la forto de la membraro mezuras kaj kunhelpas ĝian avancon al aliaj, pli-specifaj celoj.

ns

Libroj, pri kiuj la mondo parolas:

Jubileo tute ne estas ia seka protokolo; male, la tuta libro estas plenstapita je valoraj kaj stimulaĵoj, kiuj analizas la pasintecan kaj aŭguras sagace la estontecan... Troviĝas tre multaj ilustraĵoj, kaj la reprodukto estas unuaranga, liverante konservindan arĥivon pri la nuna stato de la movado.

WILLIAM AULD, SKOTLANDO
(en *Esperanto*)
57,00 gld.

Por bone kompreni la situacion de Esperanto entute, ĉiu konscia adepto de la lingvo nepre devas legi **La danĝera lingvo**.

STEFAN MAUL, FR GERMANIO
(en *Monato*)
66,00 gld.

La aŭtoro de **Amo kaj morto en Balio** liveras rakonton pri la amo, la ĝojo, kaj ankaŭ la kruela suferado en Balio frue en la nuna jarcento... La Esperanta teksto bele fluas... kaj donos plezuron al legantoj de la tuta mondo.

DON LORD, ANGLIO
(en *Heroldo*)
28,50 gld.

Ĉiutaga filozofio, jen la ĉefa temo de **Laŭdo de l' stulteco**, verko de Erasmo de Roterdamo publikigita en 1511... Post kritiko de la socio ĝenerale, la katolika Erasmo severe riproĉas la nutempajn teologiojn kaj ekleziulojn...

LA REVUO SIMPOZIO, BRAZILIO
30,00 gld.

Jen la kvintesenca de nia lingvo, verkita en modela Esperanto... Leganto kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj esperantologio trovas **Esperanto: lingvo - literaturo - movado** tre utila enkonduko en tiujn sciencojn.

JOZEF MAJOR, NOVZELANDO
(en *Novzelandia esperantisto*)
18,00 gld.

W. Auld estas poeto, tradukisto, eseisto, kritikisto, instruisto. Mi kuraĝas diri, ke ĉiujn siajn atutojn li kunigis en **La fenomeno Esperanto**. Ĉiu unuopa aspekto de Esperanto estas traktata eĉ se tra malmultaj paĝoj, tamen kun mirinda ekvilibro inter kompleto kaj sintezo.

CARLO MINNAJA, ITALIO
(en *Heroldo*)
18,00 gld.

Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke **Faktoj kaj fantazioj** estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara, senartifika kaj ofte tre originala.

H.A. DE HOOGE, NEDERLANDO
(en *Dia regno*)
36,00 gld.

Se vi opinias ke la interlingviko estas preciza scienca fako... nepre aĉetu **Plurlinguisme et communication**.

JONATHAN POOL, Usono
(en *Esperanto*)
57,00 gld.

Ĉu flanke **Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo** ege instigas la pensadon, kaj aliflanke ĝi ilustras la kutimajn konversaciojn kun skeptikaj eksteruloj je alta kaj malniva nivelo... Mi forte rekomendas la legon de ĉi tiu libro.

PROBAL DASGUPTA, BHARATO
(en *Esperanto*)
27,00 gld.

Inter la antaŭ nelonge ekhaveblaj publikigaĵoj kiuj science traktas Esperanton, elstaras kvalite la pluraŭtora studaro **Studoj pri la internacia lingvo**. Pluraj artikoloj estas ĝenerale kompreneblaj kaj legindaj de serioza esperantisto. Por esperantologia aŭ interlingvistika fakulo la tuta verko estas nemalhavebla.

EDMUND BRENT, KANADO
(en *Esperanto*)
39,00 gld.

Malgraŭ paĝnombro negranda, **Vetero kaj klimato de la mondo** havas zorge plenitan skemon de temoj. Multe da konkretaj ekzemploj de veteraj situacioj en diversaj partoj de la mondo faciligas la klimatologiajn konkludojn... Ĝojigas zorgema eldona aspekto (pli ol 150 mapoj ktp) kaj la kompetenta traduko.

ELZBIETA NAWROCKA, POLLANDO
(en *Esperanto*)
28,50 gld.

Niaj sociaj strukturoj devas evolui por akompani (la informan) revolucion... **Infoduktoj** estas aktuala kaj pensiga libro en la ĝenera "popolara scienco", kiu vere indus tradukon en Esperanto kaj respondas al vera bezono.

CHRISTIAN BERTIN, FRANCIO
(en *Esperanto*)
30,00 gld.

Mendu de la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.